

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361


10 1994

中國報道

EL POPOLA

ĈINIO





En dezerto

Foto de SONG SHIJING

## INTER NI

### Granda surprizo

Kun ege granda surprizo kaj ĝojo mi trovis en mia poŝtkesto viajn tre afablajn sendaĵojn, la 7-an numeron de "El Popola Ĉinio" kaj la belegan poŝtkarton.

Ja, dum multaj jaroj mi estis abonanto de la revuo, sed ekde 1991 pro malriĉeco mi tute ne povis pagi la postulatan monsumon. En du kaj duona jaroj mi ne povis legi vian belegan revuon. Nun, ricevinte la 7-an numeron, mi tuj kunportis ĝin al nia Esperanta klubo, kies gvidanto mi estas, kaj ni kune tradudis la belegan revuon.

**ABRAHÁM MIKLÓS**  
(Hungario)

*La redakcio de EPĈ pagas per Fondaĵo EPĈ-Abono la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj nepagipovaj ekde la 7-a numero de 1994. S-ro Miklós ja estas unu el la helpatoj. Ni esperas, ke niaj legantoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoferos al Fondaĵo EPĈ-Abono, por ke pli da legantoj havu la revuon.*

**La Red.**

### Kiel eduki infanojn?

Leginte la artikolon sur la paĝoj 10 kaj 33, n-ro 6 de EPĈ, 1994, mi volus reagi per kelkaj vortoj. En la artikolo estas priskribite, kiel fraŭlinoj sin okupas pri 133 orfoj kaj kiel ili flegas kaj prizorgas la infanojn. Laŭ la artikolo la fraŭlinoj edu-

kas kaj prizorgas la infanojn kaj donas al ili bonan ekzemplon de moralo.

Sur la paĝo 10 estas foteto, sur kiu la infanoj ricevas donacojn kaj du el la 'patrinoj' montras al ili kiel uzi la 'ludilojn'. Vidinte tiun foton, mi tamen devas konstati, ke la 'patrinoj' ne agas tiel saĝaj nek edukas la infanojn pri bona moralo. La 'ludiloj' estas imitaĵoj de mortigiloj, maŝinpistoloj.

Mi opinias, ke, edukante infanojn kiel moralajn homojn, oni NE donu al ili tiajn abomenajn 'ludilojn'! Mi esperas, ke vi komprenos mian vidpunkton.

**K. J. KLEIN**  
(Nederlando)




# ENHAVO

- 2 *INTERNI*
- 4 Impeta progreso de la nacimalplimulto  
de Ĉinio
- 7 Standardo de humaneco
- 9 *ESP-NOVAĴOJ*
- 10 Mi iris en Eŭropon
- 12 Impreso pri Esperanto-movado en  
Japanio
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*  
Nebula amo
- 16 Fabloj
- 17 En la hejmloko de Granda Budho
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*  
Yueyang en rapida disvolviĝo
- 24 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*  
Aforismoj de Tahg Zhen
- 24 *MEM PROVU*
- 25 *ARTOJ DE ĈINIO:*  
Pentraĵoj de Min Xuelin
- 28 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 29 *SUR STRATOJ:*  
Strato de fiŝhaveno
- 32 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*  
Pri grasaj infanoj de Ĉinio
- 36 "Ĉinaj Urboj" en diversaj landoj
- 40 La plej profunda kanjono de la mondo
- 42 *ĈINA KULTURO:*  
Kiamaniere elekti talentulojn en la  
antikva Ĉinio?
- 44 Amo al alilandaj infanoj
- 46 Wang Junxia — monda ĉampionino
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *AMATOROJ:*  
Wang Anjian, kolektanto de horloĝoj  
*SUR LA KOVRILLO:*  
Tie oni deklaris la fondiĝon de la Ĉina  
Popola Respubliko.
- Foto de Liu Sigong
- 2 En dezerto
- 18 Antikva urbo de Ĉinio
- 34 En Zizhuyuan-parko
- 38 Lulilo de fotistoj  
*SUR LA DORSKOVRILO:*  
Sekigo de vestoj  
La lago Nahuel Huapi

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono (p. 4)
2. Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (p. 4)
3. Guizhou-provinco (p. 4)
4. Qinghai-provinco (p. 4)
5. La granda kanjono de la rivero Yarlung Zangbo (p. 40)
6. Leshan (p. 17)
7. Dalian (p. 46)



# Impeta progreso de la nacimulplimultoj de Ĉinio

**E**N la granda familio de Ĉinio el 56 nacioj la nacimulplimultoj konsistigas 8 procentojn de la totala nombro de la familianoj, sed ili troviĝas sur pli ol 60 procentoj de la teritorio de Ĉinio. La ĉinaj nacimulplimultoj loĝas ĉefe en la provincoj kaj aŭtonomaj regionoj Ningxia (Ningŝja), Xinjiang (Ŝingĝang), Tibeto, Interna Mongolio, Guangxi (Gŭangŝji), Yunnan, Guizhou (Gujgoŭ) kaj Qinghai (Ĉinghaj). La naturaj kondiĉoj en tiuj foraj, montaraj kaj altebenaĵaj lokoj estas tre malbonaj kaj serioze malhelpis la vivon kaj ekonomian disvolviĝon de tiuj lokoj.

En la lastaj dekelke da jaroj ankaŭ la lokoj de nacimulplimultoj praktikis la politikon de reformado kaj pordomalfermo, kaj la moderna koncepto de vara ekonomio rompita la katenon de la tradicia koncepto pri natura ekonomio. Oni sin liberigis el la fermiteco, vidis pli kaj pli vastan mondon kaj rapidigis la paŝojn en la disvolvo de produktado kaj merkata ekonomio. Por la nacimulplimultoj, kiuj evoluis de la posta periodo de la primitiva socio en la modernan socion, tio estas transjarcenta impeto.

## NE SOLE GRENO KAJ BRUTOJ

Pro historiaj kialoj, dum longa tempo la ekonomio de la lokoj de nacimulplimultoj prenis agrikul-


turon kaj brutobredadon kiel la plej ĉefan aferon, kaj tia anormala strukturo de ekonomio, kiu nur povis doni minimuman vivtenadon, serioze malhelpis la disvolviĝon de la ekonomio en tiuj lokoj. Sekve plibonigi la dispozicion de la produktaj fortoj kaj reguligi la strukturon de la industrioj fariĝis gravaj paŝoj por rapidigi la ekonomian disvolviĝon kaj malgrandigi la distancon inter tiuj lokoj kaj la ceteraj disvolviĝintaj lokoj de la lando.

Dum la lastaj jaroj Ĉinio faris en la nacimulplimultaj lokoj nombron da grandaj kaj mezgrandaj konstruaĵoj, kio multe plibonigis la dispozicion de la produktaj fortoj kaj metis mate-


rian bazon por la rapida disvolvo de la ekonomio en tiuj lokoj. En la Interna Mongolio, Guizhou, Ningxia, Qinghai kaj Yunnan la grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de metalurgio, maŝinfabrado, elektroproduktado kaj karboeksploatado jam fariĝis ĉefaj fortoj en la disvolvo de la ekonomio de tiuj lokoj.

Antaŭ nelonge komenciĝis la ĉiufanka eksploatado de la sinteza projekto de la basenoj de la riveroj Yarlung Zangbo, Lhasa kaj Nianchu, por kiu la ŝtato investis miliardon da janoj. La projekto celas turni la mezan parton de Tibeto en bazon de grenproduktado, brutobredado, legomproduktado, tekstilado kaj

Germana fakulo (meze) en la Ledaĵa Fabriko de Lhasa







En kokonbobenejo en la mjaŭ-a regiono de Guizhou

teknika demonstrado. De post 1991, 200 milionoj da juanoj de la investaĵoj jam estis utiligitaj en irigacia konstruado, scienco, tekniko, trafiko, energio, agrikulturo, forstumado, brutobredado k.a. Tio unuapaŝe plibonigis la fundamentajn kondiĉojn de agrikulturo kaj la naturan ekologian fizionomion de la basenoj de la tri riveroj, altigis la sintezan produktopovon de agrikulturo kaj kreis kondiĉojn por la estonta progreso.

Nun en la lokoj de nacimalplimultoj jam formiĝis la sistemo de moderna industria strukturo kun energio, krudmaterialo, maŝino kaj kemiindustrio kiel la ĉefa parto. Tiuj lokoj jam povas produkti preskaŭ ĉiajn industriaĵojn grandajn kaj malgrandajn, kaj iuj industriaĵoj okupas gravan lokon en la lando. La totala produktovaloro de industrio superis tiun de agrikulturo. Dume radikala ŝanĝiĝo okazis al agrikulturo, forstumado, brutobredado, fiŝbredado kaj aliaj produktadoj. Rapide leviĝis la terciaraj industrioj kiel servookupo, kio pluaŝe vigligis kaj disvolvis la varan ekonomion de tiuj lokoj.

## LA TERO DONU TREZOROJN

La vasta tero de la ĉinaj nacimalplimultoj havas abundajn riĉfontojn de agrikulturo, brutobredado, energio kaj mineraloj. Sed dum longa tempo ili ne estis ekspluatitaj, kaj la popolo vivis malriĉe. La ĉefa kialo estas malnova koncepto pri produktado kaj malmoderna produktmaniero. Krome la ŝtata monhelpo plejparte estis donita al malriĉuloj, kaj investo por produktado estis nesufiĉa. Tia stato radikale ŝanĝiĝis nur en la lastaj jaroj en iuj lokoj.

La gubernio Bama en la Guoluo-a Tibetnacia Aŭtonoma Subprovinco en Qinghai, enskribita de la ŝtato en la liston de nepre helpataj malriĉaj gubernioj, abundas je ora sablo. Sed antaŭe la lokanoj superstiĉe kredis, ke oni ne devas tuŝi la teron sur la montoj, kaj ne pensis pri ekspluatado. Antaŭ 1985 la loĝantoj de la gubernio enspezis meznombro nur 100 juanojn ĉiujare. Sed iom post iom ŝanĝiĝis ilia ideologio kaj ili komencis ekspluati oran sablon. En 1988 la gubernio havis modernan oro-

ekspluatatan ŝipon, la unuan sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Dank' al la kreskado de produktokvanto de oro, 84 procentoj de la kamparanoj kaj paŝtistoj de la gubernio solvis en la jarfino de 1990 la problemon de vivtenado. Nun la tiea popolo estas sin preparanta por fari aliajn du oro-ekspluatajn ŝipojn.

La ĉina nacimalplimulto ĝino, la lasta konfirmita de la registaro en 1979, troviĝis en la transira stadio de la lasta periodo de la primitiva socio al la kampara triba komunumo antaŭ 1949. Ilia produktado estis primitiva, kaj ĉe ili estis nur objekta interŝanĝo. Nun la membroj de la nacio, kiuj loĝas 500 kilometrojn for de la provinca ĉefurbo Kunming, plene utiligis la avantaĝon de naturaj kondiĉoj de tropika klimato, multe kulturis amomon, kaj meznombro ĉiu loĝanto enspezis mil juanojn ĉiujare kaj ĝenerale oni vivas riĉe. Tia sukcesa ekzemplo pri utiligo de indiĝenaj riĉfontoj estas ofte vidata en multaj lokoj de aliaj nacimalplimultoj.

## VIGLA LANDLIMA KOMERCO

Plenforte disvolvi landliman komercon kaj kunlabori kun aliaj landoj estas vojo por rapidigo de disvolvo de la ekonomio de ĉinaj nacimalplimultaj regionoj.

Dank' al la penado en pluraj jaroj Ĉinio starigis amikajn rilatojn kun najbaraj landoj. Multaj ĉinaj nacimalplimultoj ĉe landlimoj havas lingvon kaj kulturon similajn al tiuj de la nacioj en la najbaraj landoj, kaj cetere ankaŭ tiuj landoj sin malfermis al la eksterlando por disvolvi sian nacian ekonomion. Ĉio tio donis favorajn kondiĉojn por la landlima komerco kaj internacia ekonomia kaj teknika kunlaboro de tiuj nacimalplimultaj lokoj.

La ĉinaj landlimaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj kunlaboras kun la najbaraj landoj en ekonomio, tekniko, kulturo, tu-



Alilandaj komercistoj aĉetantaj silkaĵon en vendejo de Xinjiang

rismo kaj sendo de laboruloj. Tie pli ol 100 landlimaj havenurboj kaj varopasejoj estis malfermitaj, kaj dank' al la pli ol 60 landlimaj foiroj ĉiujare duobligis la landlima komerca valoro. Multaj landlimaj urbetoj prosperiĝis kaj fariĝis bazoj de malfermo de limregionoj al la eksterlando.

En la urbo Kashi de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono oni vidas ĉie foirojn en prospero. La loko jam fariĝis centro de foira komerco en la nordokcidento de Ĉinio. La subregiono Hulun Boir de la Interna Mongolio estas plenforte pliboniganta la bazajn instalaĵojn por landlima komerco. Elstaras la urbo Manzhouli (Manĝouli). Ĝi kunagis kun multaj lokoj de la lando, energie disvolvis komercon kun Rusio kaj aliaj landoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj ankaŭ kun landoj de la Orienta Eŭropo. En 1985 Yunnan-provinco malfermis la Dehong-an Dai- kaj Jingponacian Aŭtonoman Subprovincon kiel areon de landlima komerco, kaj tio forte antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la ekonomio de la subprovinco kaj liberigis mul-

tajn nacimalplimultanojn el malriĉeco.

La vigla ekonomio de la limregionoj donis la ambaŭflankan ekonomian kompenson, prosperigis multajn entreprenojn en la limregionoj kaj aliaj lokoj de la lando kaj ŝanĝis la limregionan fizionomion de izoliteco, postiginteco kaj malriĉeco. En 1993 sole en la Interna Mongolio aperis 39 urbetoj kaj 7 vilaĝoj, kiuj enspezis po almenaŭ cent milionojn da juanoj. La meznombra pokapa enspezo de Xinjiang, Yunnan kaj Guangxi, kie granda parto de la loĝantoj estas nacimalplimultanoj, duobligis kompare kun tiu antaŭ 15 jaroj.

## **PORDO MALFERMITA AL LA EKSTERLANDO**

Iuj landinternaj regionoj, kie loĝas nacimalplimultoj, ekzemple la aŭtonoma regiono Ningxia kaj la provincoj Qinghai kaj Guizhou, ne tuŝas landlimon nek maron, sekve ili ne povas rekte vizaĝi al la internacia merkato. Ili do establis en limregionoj kaj eksterlande reprezentantajn entreprenojn, pligrandigis la planon de ekonomio, komerco, tek-

nika interŝanĝo kaj kunlaboro utiligante la lokan avantaĝon, por atingi la celon akceli la ekspluatadon de lokaj riĉfontoj kaj vigligi ekonomion.

En la pasintaj jaroj Ningxia establis dekkelke da entreprenoj en Usono, Tajlando, Singapuro kaj Hongkong, kaj samtempe enkondukis kapitalon, ekipaĵojn kaj teknologion, plenumis nombron da projektoj de industrio, agrikulturo, scienco, edukado, kulturo kaj higieno kaj faris teknikan reformadon al parto de entreprenoj. Tiuj entreprenoj fariĝis ponto inter la ekonomio de Ningxia kaj la internacia merkato.

Guizhou, kiu havas multajn malriĉajn montarojn, kun la celo solvi la malfacilan trafikajn problemojn kaj plibonigi la investan medion, koncentris la forton por disvolvi trafikon, transportadon kaj telekomunikadon, sub la helpo de la ŝtato. Nun en la provinco estas kvar trunkaj fervojoj, 32 000-kilometraj ŝoseoj kaj 15 aerlinioj. La programregata telefonio de la provinca ĉefurbo Guiyang komuniĝas kun preskaŭ ĉiuj subprovincoj, urboj kaj gubernioj de la provinco, kaj la poŝto kaj telekomunikado radias al ĉiuj lokoj de la mondo. Nun la provinco havas ekonomiajn kaj komercajn rilatojn kun 67 landoj kaj regionoj kaj importis pli ol 200 projektojn de teknologio kun totala investa sumo de pli ol 200 milionoj da usonaj dolaroj. La provinco, mistera pro la baro de montaroj, nun etendas siajn brakojn por varme akcepti diverslandajn entreprenistojn.

Laŭ statistiko, en la dek jaroj de 1980 ĝis 1990 la totala produkt valoro de industrio kaj agrikulturo de la lokoj de nacimalplimultoj kreskis 1.8-oble, kaj kvarobligis la meznombra enspezo de la tieaj kamparanoj kaj paŝtistoj. La ekonomio de la nacimalplimultoj de Ĉinio eniris en tute novan etapon. ■



# Standardo de humaneco

## — Pri la Ruĝa Kruco de Ĉinio

**L**A 12-an de majo 1994, la blanka marmora busto de Jean Henry Dunant, iniciatinto de la internacia Ruĝa Kruco, estis inaŭgurita en la ĉina urbo Fuzhou. Tiu sviso naskiĝinta en la pasinta jarcento dediĉis sian tutan vivon al la afero de la Ruĝa Kruco, kiu celas humanecon, fratecon, pacon kaj progreson. Li akiris la unuan Nobel-premion pri la paco pro sia kontribuo al protektado de la homa digneco, al akcelado de mondpaco kaj homa progreso. Li estas respektata kaj admirata de la postaj generacioj.

De post la fondiĝo de la internacia komitato de la Ruĝa Kruco en 1864, la afero de la Ruĝa Kruco iniciatita de Henry Dunant kaj la idealo, celo kaj principoj de la Ruĝa Kruco estis vaste konataj de la mondo.

Kiel membro de la granda familio de la internacia Ruĝa Kruco, la Ruĝa Kruco de Ĉinio aktivadis ekde la komenco de la kuranta jarcento. La Ruĝa Kruco de Ĉinio fondiĝis en 1904, kaj membriĝis al la internacia Ruĝa Kruco en 1919. Ĝi povas esti rigardata kiel la plej malnova publika societo de Ĉinio. La nuna Ruĝa Kruco de Ĉinio havas 130 000 filiojn kun 18 milionoj da membroj kaj ĝi estas unu el la plej grandaj organizoj de Ruĝa Kruco en la mondo.

En la malsamaj historiaj periodoj la Ruĝa Kruco de Ĉinio faris kaj faras senlacaĵon penadon por la sendependiĝo, liberiĝo kaj ekonomia konstruado de Ĉinio, por la mondpaco kaj la progresema afero de la homa-

ro, ĉiam persistante en la principoj de humaneco, justeco, neŭtraleco, sendependeco, volonteco, unueco kaj universaleco.

La malnova Ĉinio suferadis de oftaj militoj kaj diversaj katastrofoj. La Ruĝa Kruco de Ĉinio organizis dummilitajn sukurgupojn kaj ambulancojn por helpi vunditojn, enterigi mortintojn kaj helpi katastrofitajn popolanojn. En sukuro partoprenis ankaŭ fremdlandaj volontuloj en la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. Tiam internaciaj sukurgupoj viglis en ĉiuj militaj distriktoj de Ĉinio, kaj iuj el ili eĉ servis en Birmo kune kun la ĉina ekspedicio, kaj tie ili estis varme bonvenigataj de la kontraŭjapanaj trupoj. La aktivado de la Ruĝa Kruco de Ĉinio dum tiu periodo estis grava konsistiga parto de la movado de la internacia Ruĝa Kruco en la Dua Mondmilito.

En 1954, kiel la unua delegacio de la nova Ĉinio, la delegacio de la Ruĝa Kruco de Ĉinio vizitis Japanion por trakti la problemojn postlasitajn de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La vizito faris gravan paŝon en la reciproka kompreno kaj amika kontaktiĝo de la ĉina kaj japana popoloj.

La laboro de la Ruĝa Kruco rilatis al multaj flankoj de la socio. Sinpreparo kontraŭ kaj riparado de katastrofoj en la lastaj jaroj estis elstara laboro en la afero de la Ruĝa Kruco. En 1991 orienta Ĉinio estis serioze inundita, kaj la Ruĝa Kruco de Ĉinio tuj petis internacian helpon kaj tio estis respondita de la registra-




Orfoj ricevas kontrakton pri persona assekuro en la Ruĝa Kruco de Ŝanhajo.

roj, la Ruĝa Kruco kaj individuoj de multaj landoj kaj regionoj. Dank' al tio la katastrofitaj lokoj de Ĉinio akiris monhelpon je 340 milionoj da juanoj de eksterlande. La filioj de la Ruĝa Kruco de Ĉinio faris mondon-acon, kunagis kun la higienaj administracioj en ekspedo de 18 mil sukurgupoj. La grupoj helpis 2.24 milionojn da suferantoj de katastrofo. Ilia penado maksimume reduktis damaĝon de la inundo en orienta Ĉinio kaj evitis postkatastrofan epidemion.

Ĉinio havas vastan teritorion, sekve ofte okazas naturaj katastrofoj. Laŭ la specoj de katastrofoj, la dislokiĝo de la regionoj de oftaj katastrofoj kaj fundamenta stato de la ŝtato, la Ruĝa Kruco de Ĉinio disvolvis en la tuta lando reton de sinpreparo kontraŭ kaj riparado de katastrofoj. Sub la helpo de la internacia Ruĝa Kruco, Ĉinio fondis ses transprovincajn kaj du provincajn sukurocentrojn, kaj du el ili jam komencis sian servon. Du lokoj mem kolektis monon por starigi sukurocentron. La fondiĝo de tiuj centroj multe levis la kapablon de la Ruĝa Kruco de Ĉinio en la batalo kontraŭ la katastrofoj.

Sukuro estas la plej tradicia laboro de la Ruĝa Kruco. Tiu laboro de la Ruĝa Kruco estas limigita je la tempo inter la okazo de sinistro kaj alveno de fakuloj. La Ruĝa Kruco de Ĉinio vaste diskonigadis sukurismon kaj trejniis laŭeble pli multajn homojn, por ke ili povu fari ĝustan flegon al la vunditoj. En la lastaj jaroj, krom tradicia maniero de su-



En la sangokolekta centro de la Ruĝa Kruco de Pekino

kuro, la Ruĝa Kruco de Ĉinio faris sukuran trejnadon konforman al la diversaj profesioj en trafikado, karboekspluatado, navigacio, forstumado, geologia prospektado, petro-la industrio, fajroestingado, turismo k.a.

Senpaga sangodono, medola gref-to, flegado de maljunuloj, asekuro de infanoj kontraŭ gravaj malsanoj estas praktikataj en Ĉinio sub la propono de la Ruĝa Kruco de Ĉinio. La Ruĝa Kruco havas tra la tuta lando 47 sangoliverajn staciojn. Ĝi starigis premion por popularigi la volontan sangodonon. Marte de 1992 la Ruĝa Kruco de Ĉinio sin preparis por starigi ĉinan medolan bankon, kio multe esperigis la ĉinajn suferantojn de leŭkemio. La Ruĝa Kruco de Ŝanhajo starigis 25 flegejojn de maljunuloj kaj kunage kun la asekura kompanio de Ŝanhajo disvastigis asekuron por hospitala kuracado de mezlernejanoj, elementlernejanoj kaj infanoj. Dank' al tio la vivmedio de la maljunuloj kaj geknaboj, plej facile atencataj, evidente pliboniĝis. La sperto de Ŝanhajo estas disvastigata de la Ruĝa Kruco de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Asekura Kompanio tra la tuta lando.

En la kamparo, la sanitara sukura reto de la Ruĝa Kruco de Ĉinio jam fariĝis suplemento de la higiena garantio, kaj ludas aktivan rolon en penado por efektiveco de "al ĉiu hi-

gienan garantion en la 2000-a jaro". Instigate de la humaneco, frateco kaj oferemo de la Ruĝa Kruco, la kamparanoj memvole interhelpas en laboro kaj helpas seninfanajn maljunulojn kaj labornekapablulojn en ilia produktado kaj ĉiutaga vivo. La Ruĝa Kruco multe atentis pri la edukado al lernantoj. "Respektu maljunulojn, helpu invalidojn kaj malriĉulojn kaj solvu iliajn malfacilojn", per tiu aktivado geknaboj perceptis la noblecon de helpemo, starigis al si socian devokonscion kaj oferemon. Pro sia pli kaj pli vigla aktivado la Ruĝa Kruco de Ĉinio altiris al si grandan nombron da prudentuloj.

La alia historia kontribuo de la Ruĝa Kruco de Ĉinio estas helpado al la registaro en la aferoj rilate Taiwan. Taiwan-insulo estas unu el la ĉinaj provincoj. Sed pro la historiaj kaj politikaj kialoj, fremdiĝis la samlandanoj ambaŭflanke de la markolo, kiu apartigas Taiwan disde la ĉina ĉeftero. Malfermo de Taiwan-markolo estiĝis de parenco-serĉado de samlandanoj ambaŭflanke de la markolo. Preskaŭ ĉiuj civitanoj de la ĉefparto de Ĉinio, kiuj havas parencojn en Taiwan, estis helpitaj de la Ruĝa Kruco de Ĉinio. La Ruĝa Kruco de Ĉinio transigis 128 mil leterojn de parenco-serĉo, kaj 24 000 homoj retrovis la parencojn perditajn antaŭ multe da

jaroj. Intervizito de gvidantoj de la societoj de la Ruĝa Kruco de ambaŭ flankoj efektivegis la reciprokadon de la du societoj kaj akcelis la progreson de la interrilatoj de ambaŭ bordoj.

La Ruĝa Kruco de Ĉinio havas bonajn kunlaborojn kun la internacia federacio de la Ruĝa Kruco kaj kun la societoj de la Ruĝa Kruco de multaj landoj. La plano de establo de sukurcentroj kontraŭ katastrofoj en Ĉinio estis multe atentata de la internacia federacio de la Ruĝa Kruco kaj helpata de la Ruĝa Kruco de Japanio, Germanio, Kanado kaj Usono. En Xigaze de Tibeto, la Ruĝa Kruco de Svisio kaj Ĉinio kune starigis trejnobazon por kamparaj sanitaristoj. Malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj, la bazo trejniĝis en 6 jaroj pli ol 300 sukuristojn, kaj tiuj servas tra la tuta Tibeto. La Ruĝa Kruco de Ĉinio sendis elstarajn personojn al la internacia federacio. Ili ĉiuj diligente laboras sur sia posteno kaj iuj el ili oferis sian vivon. Ilia faro estis laŭdata de la internacia federacio.

La afero de la Ruĝa Kruco de Ĉinio jam iom post iom formis sian propran sistemon kaj certe atingos pli grandan progreson dank' al ellaboro de la "Leĝo de la Ruĝa Kruco de la Ĉina Popola Respubliko" en 1993. ■



## ESP-NOVAĴOJ

● La 21-an de junio 1994 la Ĉina Filatela E-Asocio okazigis sian unuan laborkunvenon de konsilantoj. En la kunveno oni interkonsiliĝis pri aliĝo al la Esperanto-Ligo Filatelista kaj la Ĉina Filatela Federacio, varbado de membroj, eldonado de organo ktp.

● De septembro 1993 ĝis februaro 1994 la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco kaj la Changshu-a Poŝtmarka Kompanio de Jianguo-provinco faris kaj uzis memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, por adaptiĝi al la emisio de novaj poŝtmarkoj fare de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio. La poŝtstampoj temas pri la Sepa Sportkunveno de la Ĉina Popola Respubliko, Longmen-ŝtonkavernaro, Changbai-montaro, abeloj, antikvaj lakaĵoj de Ĉinio, elektitaj verkoj de Zheng Banqiao, patriotaj demokratoj, 100-jariĝo de generalo Yang Hucheng kaj 100-jariĝo de prezidanto Mao Zedong. La desegninto de la poŝtstampoj estas veterana esperantisto Zhang Linrui.

● La Bahaa Esperanto-Ligo kompilis materialojn pri Lidia Zamenhof por la 50-jariĝo de ŝia terura ekstermiĝo en la nazia pereigejo Treblinka. Inter la materialoj troviĝas "Lidia Zamenhof — Heroldino de Homara Unueco" de Heinz Dieter Maas, kaj "Bahaaĵ Informoj" de junia numero en 1947, kie aperis nekrologo pri Lidia Zamenhof, ktp. Detalaj informoj ĉe s-ro Bernhard Westerhoff, sekretario de la Bahaa Esperanto-Ligo: P.K. 500133, D-60391 Frankfurt, Germanio.

● Post kelk-jara paŭzo okazos la 26-a Pola Esperanto-Kongreso de la 19-a ĝis la 23-a de oktobro en la urbo Staszów. La Antaŭkongresa Ripozrenkonto okazos de la 15-a ĝis la 19-a de oktobro. En la programo oni antaŭvidas ekspozicion pri la Esperantaj libroj kaj gazetaraj, teatro-prezentadojn kaj muzikvortajn recitalojn, diversajn kursojn de la Internacia Lingvo ktp.

● La Sveda Esperanto-Federacio okazigis sian jarkunvenon de la 27-a ĝis la 29-a de majo 1994 en la urbo



En la ŝirmekspozicio "Esperanto en radio" de Svedio

Apude estis aranĝita angulo, kie la kongresanoj povis sidi kaj komforte aŭskulti specimenojn de diversaj Esperanto-programoj. Krom tio, surtable kuŝis foliujoj kun pliaj informoj pri la radiostacioj (horaroj, adresoj) kaj la enhavo de la sonbendoj. Poste la ekspozicio estis daŭre montrita en aliaj svedaj lokoj.

Junaj esperantistoj de ĈEL kaj EPĈ ekskursantaj en Heibei-provinco



Membroj de la Esperanta seminario en Leskovac

● En marto kaj aprilo de 1994 okazis Esperanta seminario en la urbo Leskovac de Jugoslavio por lernantoj de elementaj lernejoj. Pli ol 20 gelerntoj finis la seminarion kaj faris prezentadon sub la titolo "Esperanto kaj muziko nobligas homojn kaj infanojn". La seminarion organizis la Esperanta Societo kaj Junula Konsilio.

Höör situanta en la suda parto de Svedio. Partoprenis pli ol 100 esperantistoj el Svedio kaj ankaŭ eksterlandaj gastoj el Finnlando, Germanio kaj Hungario. Ĉe la enirejo de la kongresejo oni starigis ŝirmekspozicion — "Esperanto en radio" kaj dek rubrikoj, inter ili troviĝas Radio Pekino, Pola Radio, Radio Esperanto de Malmö en Svedio, Estona Radio ktp.



# Mi iris en Eŭropon

**K**IAM mi preparis min por la TEJO-KER-seminario, antaŭ la temo “Trans la limoj de Eŭropo” mi diris al mi mem: por eŭropanoj la vorto “trans” signifas “eliri” kaj por mi “eniri”. Do, por fari kontribuon al la seminario, kiel reprezentanto de Azio kaj la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA), mi devis anticipe vojaĝi tra la tuta Eŭropo anime, antaŭ ol korpe esti en Eŭropo.

La preparo estis streĉa. Kun kapo plena de historiaj terminoj, kiel Renesanco kaj Industria Revolucio, kaj la brilaj nomoj Ŝekspiro kaj Betoveno, mi rimarkis, ke venis la tempo ekvojaĝi.

Vicĉefredaktorino de nia revuo “El Popola Ĉinio”, s-ino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu), akompanis min al la flughaveno. Ŝi estas tre afabla kaj simpatia gvidanto, kiu diris al mi trankviligajn vortojn.

## MIA UNUA PAŜO SUR LA EŬROPA KONTINENTO

Mia unua paŝo en Eŭropo tuŝis la teron de la flughaveno de Frankfurto, la plej granda flughaveno en Eŭropo. Mi tre miris, ke la flughaveno havas multajn en- kaj elirejojn. Tamen mi ne sentis tion fremda. Kiel ĉina junulo de la 90-aj jaroj, mi pli multe konas pri la mondo, kaj kiel esperantisto, mi havas nemalmultajn amikojn en Eŭropo.

Jen f-ino Sabira Ståhlberg, intima amikino de ĉinaj esperantistoj kaj TEJO-komisiito pri Azia Agado, atendis min ĉe elirejo kune kun s-ro Bernhard Westerhoff, frankfurtano kaj sekretario de la Bahaa Esperanto-Ligo. Mi tuj sentis, ke sur la eŭropa kontinento, fore de

mia patrolando, mi iros en Esperantujon — grandan internacian familion de esperantistoj.

Sabira, kiu ĵus ricevis licencon pri ŝoforado, per la aŭto de Thomas Pusch (TEJO-estrarano) “kuraĝe” veturigis min kaj s-ron Barnabas Magesee el Tanzanio, reprezentanton de Afriko, tra la ŝoseo de Frankfurto al Bonn.

## VERA INTERNACIA LABORISTA TAGO

Post mallonga restado en Bonn ni tri kun finnlanda f-ino Anna Ritamäki, TEJO-komisiito pri reprezentigo ĉe la Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizoj (EKB), veturis trajne al la franca urbo Strasburgo. En la vagonaro ni renkontis f-inon Lucie Karešová, prezidanton de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo.

Ĉe la landlimo inter Germanio kaj Francio ne estis kontrolo, kiun mi imagis. Ni kvinope iris el la grandioza antikva stacidomo de Strasburgo kaj sentis nin kiel hejme — ni seminarioj tie unu semajnon.

Ni atendis ĉe aŭtobusa haltejo.

Tamen post longa tempo ne venis aŭtobuso nek aliaj atendantoj. Fine ni konsciis, ke hodiaŭ estas la 1-a de majo — la Internacia Laborista Tago. La aŭtobusaj ŝoforoj de Strasburgo havis veran laboristan feston, kaj ni devis piediri kun neleĝera pakaĵo, rigardante la urban vidindaĵon.


Strasburgo estas pitoreska antikva urbo, sed kiam ni atingis la Eŭropan Junularan Centron ĉe la nordorienta angulo de la urbo, ni konkludis, ke ne indas promeni kun la peza pakaĵo en tiel bela urbo.

## MIA UNUA TEJO-SEMINARIO

Pli ol 30 reprezentantoj el 23 landoj seminarioj unu semajnon en la Eŭropa Junulara Centro. En la interkona vespero mi konatiĝis kun f-ino Edlyn Teske, vicprezidanto de TEJO kaj ĉefa organizanto de la seminario. Ni ĝoje interparolis kaj interŝanĝis opiniojn pri la movado. Mi pensis, ke la seminario certe sukcesos pro tiu kapabla organizantino.

La altnivela internacia semina-

Prezentado dum TEJO-seminario







La aŭtoro (dekstre) kaj aliaj junaj esperantistoj propagandas Esperanton en Strasburgo.

rio havis dekelkajn prelegojn pri politiko, ekonomio, ekologio, religio ktp. La vidpunktoj de reprezentantoj el Azio, Afriko, Latinameriko kaj Oceanio vekis grandan intereson de la eŭropaj junuloj.

En la seminaria broŝuro aperis mallongigo de mia prelego. Martin Burkert ilustris ĝin per papago, kiu portas ĉinan robon kaj ridetas kun manoj en la manikoj. Tiuj, kiuj ofte legas TEJO-eldonaĵojn, certe konas la papagon, kiu estas genia kreaĵo de Martin kaj ĉefa trajto de TEJO-eldonaĵoj. Mi tre ŝatis la bildon, tamen certe mi aspektis kiel moderna junulo, sed ne portis antikvan robon. Inter mi kaj aliaj junuloj ne estis distanco: Ili stariĝis demandojn pri mia prelego kaj varme diskutis; ni portis mallongan pantalonon kaj kune kantis la himnon "Figio" (lando de figo), kiun ni kreis en la ludgrupo; dum la debatludo ni kune aplaŭdis Georgo Kamaĉo el Hispanio pro lia elokventeco; okaze de la 20-a datreveno de la naskiĝo de Nora Csiszar de Hungario ni kune prezentis kantojn; mi ludis bilardon kun Jeroen Balkenende el Nederlando kaj Nils Brinkmann el Germanio; mi interparolis pri Esperanto-revuo kun Ertl Istvan, redaktoro de ESPERANTO, kaj Francisco Veuthey, redaktoro de KONTAKTO; mi kantis Esperantajn kantojn kun Zdravka Bojĉeva, vicĝenerala sekretario de TEJO, kaj rusa knabino Maria Kochetkova; kun plezuro mi ludis teatreton

kun Annette, fratino de Sabira, Ralf Gion Fröhlich el Danlando kaj aliaj...

Mi ege kontentis pri la bela kaj harmonia renkontiĝo kaj miris, ke junuloj el diversaj landoj povas tiel facile amikiĝi.

Mi informiĝis, ke por neeŭropano estas tre malfacile veni al la Eŭropa Junulara Centro por tia seminario, do mi vere komprenis la penigan laboron kaj klopodon de Sabira. Eble ŝi estis tre laca, ŝi malvarmumis dum preskaŭ la tuta seminario, tio multe maltrankviligis min.

Mi konfesas, ke la seminario estas vere internacia, neforgesebla renkontiĝo, kiu donas al mi plenan fidon pri la estonta kunlaboro inter ĈJEA, TEJO kaj aliaj junularaj organizoj.

## ĈE BONAJ AMIKOJ DE BONN

Ĉe la fino de la seminario mi adiaŭis la amikojn, kun kiuj mi kunestis unu semajnon. Thomas Pusch stiris sian multeuzatan aŭton el Bonn por reveturigi nin. Tiu belaspekta junulo estas aktivulo kaj "ministro pri informado" en TEJO-estraro. En Bonn min multe impresis lia aktiveco kaj kreivo per lia iniciata kaj progresiga laboro en la Germana Esperanto-Junularo.

Dank' al la zorgema aranĝo de Sabira, en Bonn mi povis ne nur kontakti kun aktivuloj kiel Thomas, TEJO-estrarano Klaus Dahmann, ĝenerala sekretario de la

Germana Esperanto-Junularo Marko Lins, Martin Burkert kaj aliaj, sed ankaŭ sperti diversajn flankojn de la eŭropa movado.

Mi aŭskultis la prelegon de taĝika esperantistino kun plenaĝuloj en la Kolonja Esperanto-Klubo; post interparolado kun knabinoj en Esperanto-kurso mi estis surprizita, ke ili ekkonis Esperanton nur antaŭ unu tago; dekoj da gimnazianoj biciklis de Kolonjo al Bonn por la ĉina vespero organizita de Sabira kaj mi, ili laŭdis la ĉinan kuirarton, kvankam iuj el ili ne sciis uzi ĉinajn mangbastonetojn.

## EN LA CENTRO DE ESPERANTO-MOVADO

Pri la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo mi longe sopiris. Ĉi foje mi havis eblecon ligi nomojn kun afablaj vizaĝoj. S-ro Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, ofte diris neatenditajn humorajn vortojn. S-ro Osmo Buller el Finnlando, direktoro de la Centra Oficejo, havas trajtojn de nordano: sincereco kaj helpemo. Bedaŭrinde, aliaj oficistoj devis ferii la sekvantan tagon kaj mi nur haste renkontiĝis kun ili.

S-ro Osmo Buller akompanis min por viziti diversajn lokojn de la Centra Oficejo kaj poste demandis, kian libron mi ŝatas. Mi diris, ke mi preferas libron pri la historio de Esperanto. Li ĝoje donacis al mi kelkajn librojn. Sur la titolpaĝo de unu el ili li skribis: "Nur tiu, kiu konas la pasintecon, povas konstrui la estontecon."

Antaŭ ol mi havis tempon por pensi pri mia spertaĵo, Eŭropo jam adiaŭis min. En la stacidomo de Bonn mi diris "Ĝis revido" al Sabira, kaj doloro aperis sur mia vizaĝo, ĉar mi ne povis kaŝi ĝin en la koro. Por mi la dusemajna vojaĝo en Eŭropo estas neforgesebla. La pensoj, kiujn mi interŝanĝis kun amikoj dum la vojaĝo, montras brilan perspektivon de kunlaboro. Eniro en Eŭropon kaj eliro el ĝi donis al mi pli da spertoj. Mi kredas, ke pli da junaj ĉinaj esperantistoj iros de Ĉinio al la mondo, trans ĉiuj limoj, al la vera unuiĝo de la homaro. ■

# Impreso pri Esperanto-movado en Japanio

**E**N aŭgusto pasintjare, laŭ invito de la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA), mi partoprenis la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj kaj la ceremonion de la 70-a jubileo de la fondiĝo de EPA, okazintajn en Kameoka. Post la du jubileaj eventoj mi vizitis Takatuki, Osaka, Nagoya, Tokion, Sapporo, sume dekkelkajn urbojn, dank' al la aranĝo de EPA, s-ro Umeda Yosimi, s-ro Tanaka Josikacu kaj ges-roj Takeuti. La vizitoj, kvankam tre hastaj, havigis al mi ŝancojn vaste konatiĝi kun amikaj kaj gastamaj samideanoj de tiuj urboj kaj informiĝi pri la Esperanto-movado en Japanio.

De multaj jaroj la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto aktivadas enlande kaj internacie, sin dediĉas al propagando de Esperanto kaj diskonigo de la tradiciaj japanaj kulturo kaj arto pere de Esperanto, faras internaciajn kulturajn interfluojn kaj iniciatis la Premion Deguchi, kiun la estraro de Universala Esperanto-Asocio ĉiujare aljuĝas al tiuj, kiuj "utiligas Esperanton kaj kontribuas al la monda paco kaj interkultura kompreniĝo". Tiel EPA faris aktivan kontribuon al la monda paco kaj diskonigo de Esperanto.

Min forte impresis, ke en ĉiu el la vizititaj urboj troviĝas Esperanto-organizo kaj viglaj movademuloj kaj Esperanto ne

nur estas konata por urbanoj, sed ankaŭ ricevas simpatian kaj subtenon pro sia pozitiva rolo en la socia kaj politika vivo.


La urbo Takatuki ĝemeliĝis en 1987 kun la urbo Changzhou (Ĉangĝou) en orienta Ĉinio pere de Esperanto. De tiam la du urboj konstante faras interŝanĝojn kulture, ekonomian, komercan, teknikan kaj ankaŭ personaran. La Esperanto-Asocio de Takatuki ĉiujare organizas Esperanto-ekspozicion kadre de la kultura festivalo de la urbo. Pasintjare okazis jam la 28-a ekspozicio senprecedence riĉa kaj konvinka. La magistrato alte taksis ilian laboron, vidante tiel grandan rolon de

La aŭtoro (en okulvitroj) inter gelernantoj de la infana Esperanto-kurso de Takamori

Esperanto. Kiam mi kaj s-ino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu) de "El Popola Ĉinio" vizitis la urbodomon, akompanate de ges-roj Takeuti kaj s-ro Nishikawa Toyozo, vicurbestro Kozo Miyagawa honoris nin per afabla akcepto nome de la urbestro oficvojaĝanta aliloke. La loka ĵurnalo raportis pri nia vizito sur la plej okulfrapa paĝo.

La vizito al la oficejo de Kansaja Ligo de Esperantistaj Grupoj vidigis al mi la solidan laboron, oferemon kaj strebemon de japanaj samideanoj. La oficejo funkcias ankaŭ kiel libroservo, plene plena de diverslandaj libroj pri kaj en Esperanto. Tie mi renkontiĝis kun s-ro Sakamoto Syozi kaj intervjuis lin. Li laboras preskaŭ volontule kiel plentempa sekretario de la ligo. Dum la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj li estis honorita per Premio Osaka, la plej prestiĝa premio en la japana movado.

Similan libroservon mi vidis ankaŭ en Tokio, en la oficejo de la Japana Esperanto-Instituto (JEI). Tie mi konatiĝis kun ĝiaj du konstantaj oficistoj s-ro Yosio Isino kaj s-ro Kitagawa Hirasi. Iliaj diligenteco kaj oferemo estas kortuŝaj. S-ro Kitagawa Hirasi diris, ke laborante kiel oficisto de JEI li ricevas salajron malpli multan ol en aliaj oficejoj, tamen li ĝojas



labori por Esperanto.

La instruado de Esperanto fare de JEI estas tre distingiga. JEI funkciigas ĉiusemajne kvar kursojn de malsamaj niveloj. Tio daŭras jam plurajn jarojn. Mi bonŝance ĉeestis unu el tiuj kursoj kaj ĝoje vidis, ke la kursanoj estas tre diligentaj kaj viglaj.

Dank' al arango de s-ino Syozi Keiko, mi ĉeestis redaktoran kunsidon de la Revuo Orienta kaj renkontiĝis kun du respondeculoj de la Japana Esperanto-Junularo. Eĉ nun mi ankoraŭ tre ĝojas, ke mi havis la okazon diskuti kun tiuj promesplenaj junuloj pri eblecoj okazigi komunan seminarion de junaj esperantistoj ĉinaj, japanaj kaj koreaj.

De s-ro Inumaru Humio, juna direktoro de JEI, mi ĝoje informiĝis, ke 8 lokaj Esperantaj organizoj decidis kunlabori kun JEI. Tio sendube favoros la disvolviĝon de la movado en Japanio. Mi ankoraŭ interparolis kun iuj direktoroj de JEI pri kunlaboro inter nia sekcio kaj JEI. Mi esperas, ke la kunlaboro estos plifortigita kaj fruktdona.

La Esperanto-movado viglas ne nur en grandaj urboj, sed ankoraŭ en urbetoj, kiaj Sagae de Yamagata kaj Takamori. La lokaj esperantistoj ĉiujare organizas diversajn agadojn, ekz. la vintra speciala okazaĵo "Néga skiad-kunloĝado"

S-ro Nishikawa Toyozo (maldekstre) kaj la aŭtoro



organizita de la Yamagata Esperanto-Klubo ĝuas sufiĉe grandan famon, kaj en ĝi partoprenas interesitoj ne nur el diversaj lokoj de Japanio, sed ankaŭ el aliaj landoj. La infana Esperanto-kurso de la Elementa Lernejo de Takamori altiras al si apartan atenton. S-ro Nobuyosi Hukagawa estas pensiulo, tamen li ankoraŭ laboras en la lernejo. Mi demandis: "Kial?" Li respondis serene, ke li volas instrui Esperanton al infanoj por la estonteco de nia lingvo. Por sukcesigi la kurson li ŝparis nek monon nek energion nek tempon. Li afable gastigis multajn esperantistojn el aliaj landoj, dum li mem vivas ĉiam simplan vivon.

Movademuloj ne mankas ankaŭ en Hokkaido, la plej norda parto de Japanio. S-ino Kitabatake Hitomi, s-ro Kimura Kimiharu kaj s-ro Kodama Hiroo estas tre elstaraj veteranoj. Sub ilia gvidado Esperanto-kursoj ne ĉesas en diversaj urboj de Hokkaido. Estas tre kortuŝe, ke s-ro Kimura Kimiharu aĝas jam 83 jarojn, tamen ankoraŭ senlace semas sur verda kampo. Pro lia kontribuo al la movado lin honoris la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj per Esperanta brakhorloĝo speciale farita.

Parolante pri la japana movado, mi ne povas ne aparte mencii la vigan Esperanto-Klubon de Amatora Radio. Ĝi eldonas mona-

tan organon kaj ĝiaj membroj, ĉiuj lertaj en manipulado de sia maŝinaro, aktive agadas en diversaj urboj de Japanio. Ili ofte renkontiĝas por kunloĝado aŭ montogrimpado. En interkomunikado ili uzas nur Esperanton. Eble ĝuste pro tio, ili ĉiuj parolas nian lingvon tre bone.

Multaj el ili ankaŭ gvidas Esperanto-kursojn kaj energie laboras por akceli la movadon tra la lando. Menciindas ankaŭ, ke la klubo tre atentigas sian amikecon kun ĉinaj Esperanto-radioamatoroj. S-ro Tanaka Yosikacu, sekretario de la klubo, plurfoje gvidis vizitgrupon al Ĉinio kaj helpis ĉinajn radioamatorojn starigi du radioamatorajn staciojn.

Ankaŭ la Internacia Kultura Laborejo (IKL) entreprenata de s-ino Umeda Setuko meritas apartan mencion. Kun la celo plene montri la praktikan valoron de Esperanto, la laborejo dediĉas sian servon al la movado, kondukante kulturajn kaj akademian interfluojn inter diversaj landoj per Esperanto. En marto ĉi-jare, dank' al la klopodo kaj kunlaboro de IKL kaj nia Esperanta Sekcio, s-ro Umeda Yosimi, direktoro de IKL, vizitis Ĉinion, gvidante la Kulturalan kaj Akademian Interŝanĝan Vizit-grupon de Waseda-kolegio. Dum la vizito ili havis tre sukcesan akademian interŝanĝon kun ĉinaj stenografiaj specialistoj kaj studentoj kaj ege kontentis pri la rezulto de tiu faka interŝanĝo.

La vigla Esperanto-movado en Japanio kaj la gastamaj japanaj samideanoj faris sur min profundan impreson kaj multe min edifis. Sed ne eblas, ke mi rakontu ĉion, kion mi spertis, en tiu ĉi mallonga artikolo. Mi do resumu miajn milojn da vortoj per unu frazo: Prosperon al la japana Esperanto-movado! Sukceson al la kunlaboro kaj eternan amikecon inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj! ■

\*La aŭtoro estas vicdirektoro de la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia.



# LA LINGVO DE PACO

Teksto de Eta Wigforss-Fritz

Muziko de Sven Österberg

Vive

G /A G/H C G D

1. Ho - moj so - pi - ras al pa - co kaj am', de - zi - ras  
 2. Ti - al ni ho - moj en nor - do kaj sud' de - vas ja  
 3. Vi - vu la lin - gvo cent kelk - ja - ra jun'. Kres - ku kiel

D D D7 /E /#F G /A G/H

1. ke ĉi - uj ba - ta - li - loj estu for. Gen - toj mal - sa - mas je  
 2. trans - for - mi nin al u - nu ho - mar'. A - mi - ke pa - ro - lu kun  
 3. ar - ba - ro en la prin - tem - pa sun'. Vi - vu kun ĝo - jo dum

C /H Am D7 G/H Cmaj7 D D7 G

1. mo - roj kaj pli, sed fun - de sen - tas si - mi - le.  
 2. aj - na land - an'. E - blas ja Es - pe - rant - lin - gve.  
 3. mil ja - roj plu. Ven - ku la gran - da i - de - o!

*La Esperantan himnon "La lingvo de paco" oni lanĉis somere de 1993 kadre de regiona kunveno en Oskarshamn, Svedio, aranĝita de la ticia nova Esperanto-klubo. La teksto el liberaj versoj temas pri pacamo kaj la melodio simpla kaj bela tre konvenas por horo.*

# NEBULA AMO

**K**IAM mi estis malgranda knabineto, mi tre ŝatis iun longan blankan jupon. Mi vidis ĝin en montrofenestro de butikoj. La jupo havis multe da plisoj, la basko estis tre larĝa, kaj mi pensis, ke portante de tiu jupo certe estos gracia. La talio estis larĝa, se oni aldonos al ĝi larĝan blankan zonon, ĝi aspektos pli bele. Portante tiun jupon, oni povos porti violan ĉemizon. Se la vetero estos malvarmeta, oni povos aldoni veŝton. Je la unua vido mi ekŝatis ĝin kaj kredis, ke oni faris ĝin speciale por mi. De tiu tago, kiam mi revenis hejmen de la lernejo, mi intence iris pli longan vojon por rigardi la jupon. Ĉiufoje, kiam mi vidis ĝin en la montrofenestro, mi fariĝis

trankvila. Mi kvazaŭ aŭdis, ke la jupo vokis min: "Min aĉetu, ne hezitu!" Sed tiam mi estis lernanto kaj ne havis monon por aĉeti tiel karan jupon. Mi estis kontenta, ke mi povis vidi ĝin ĉiutage.

Iun tagon, post leciono mi refoje iris al la butikoj por rigardi ĝin. Sed mi ne vidis ĝin. Certe oni aĉetis ĝin kaj iu knabino estis portanta ĝin. Mi venis hejmen malgaje. Ĝis nun mi kredis, ke la jupo estis la plej bela por mi, sed ĝi ne apartenis al mi.

Mi kreskis kaj eklernis en supera mezlernejo. Mi renkontis knabon. La unuan fojon mi renkontis lin en la ludkampoj de la lernejo. Li bone ludis basketbalon kaj povis trafe ĵeti la pilkon en la korbon de malproksime, kaj oni malfacile


povis depreni de li la pilkon. Mia rigardo fiksiĝis sur li, ĝis kiam la pilko ruliĝis ĉe mian piedon. Mi levis la pilkon, sed ne ĵetis ĝin al li. Li grandpaŝe iris al mi, prenis de mi la pilkon kaj diris "dankon". Li ĝentile salutis min kaj reiris al la ludejoj.

De tiam mi ofte vidis lin en manĝejoj kaj sur la vojoj. Foje li salutis min, foje li preterpasis min senforte. Mi ne revis interparoli kun li, mi nur esperis, ke mi ofte renkontos lin, ke li salutos min kun rideto.

Tiutempe mi subite rememoris la longan blankan jupon, kiun mi ege ŝatis. Nun mi ekhavis la similan senton. La knabineto jam kreskis, kaj la deziro por jupo fariĝis alia ŝajne fremda kaj samtempe ankaŭ konata sento. Mi ne multe revis pri tiu sento, sed mi esperis, ke tiu sento daŭros longe.

Poste li diplomitiĝis el la lernejo kaj dum longa tempo mi ne vidis lin. Sed iun tagon mi vidis lin en la homa fluo sur strato. Sed li havis tre belan knabinon apud si. Tiam mi ekhavis la senton, kiun mi havis en la tempo, kiam mi ne vidis la jupon en la montrofenestro.

Eble io neakirita estas la plej bona. Vere, de tiam mi ne vidis jupon pli belan ol tiu longa blanka jupo, nek rehavis la delikatan, nebulan sed tre dolĉan senton pri la knabo. ■



## Fabloj

# Kiel vulpo fariĝis ĉefministro?

de MA DA

**K**IAM vulpo gvidis tigroreĝon inspekti la regnon de sovaĝaj bestoj, la bestoj aspektis respektive time-maj. Opiniante, ke la vulpo estas sendita de Dio por administri la regnon de sovaĝaj bestoj, ankaŭ la tigroreĝo tre respektis la vulpon. Kaj tiu ĉi bone sciis, ke li ankoraŭ ne havas firman lokon en la koro de la tigroreĝo, kaj ke li devas fari multon por tio.

La vulpo venis al ĉambelano leopardo, dirante: “Kara fraĉjo, ĉu vi vidis, kiom respektama al mi estas la tigroreĝo, kiam li inspektis la regnon sekvante min? Se vi prezentos al li plue laŭdajn vortojn pri mi, mi certe rekompencos vin.”

Poste, li vizitis juĝiston lupo, dirante: “Kara fraĉjo, mi jam prenis la tigroreĝon kiel mian adoptan patron. Cirkulas la diro, ke oni devas neniam inciti malkonkordon inter la parencoj. Bonvolu ne diri plue kalumniajn vortojn pri mi al la tigroreĝo. Ekde nun ni estos bonaj fratoj kaj kune dividos

feliĉon.”

La vulpo vizitis generalon elefanto kun bananoj, dirante: “Estimata, vi estas tiel fortega kaj gardostaras por la regno. Vi jam faris grandan meriton por ĝi. Bonvolu akcepti la tre modestan donacon kiel mian respekton al vi. Mi certe

rakontos al la tigroreĝo pri via merito kaj petos lin promocii vin!”

Kun junaj spikoj de maizo li venis al doktoro urso, dirante: “Vi estas prestiĝa erudiciulo. Sed oni maljuste traktas vin kaj vi eĉ ne havas taŭgan kabineton. Fakte, la tigroreĝo tre konfidis kaj ĉiam aŭskultas min. Mi rekomendos al li elekti vin kiel akademianon kaj doni al vi grandan domon.”

La vulpo vizitadis altranguojn de la regno de sovaĝaj bestoj.

Kien ajn la tigroreĝo venis, li aŭskultis laŭdon pri la vulpo. Li pensis, ke la vulpo estas sendita de Dio kaj ĉiuj respektas lin, kaj nomumis lin ĉefministro. Tiel la vulpo fariĝis ĉefministro de la regno de sovaĝaj bestoj.



## La Mensogo kaj la Vero

de JIN JIANG

**L**A Mensogo kaj la Vero konkuras por scii, kiu el ili estas pli ŝatata de la homoj.

La Mensogo sin ŝminkas, surmetas belajn vestojn kaj diras orelplaĉajn vortojn. Per tio li trompas multajn homojn kaj gajnas al si multajn laŭdojn.


Kaj la Vero, portante simplan veston kaj neniom ornamente, diras neorelplaĉajn vortojn. Tio ne nur ne estas atentoaltira, sed pikas la koron de hipokrituloj.

La rezulto de la konkuro montras, ke la Mensogo venkis la Veron.

La Mensogo fiere demandas la Veron: “Nu, ĉu vi ne malĝojas pro la malvenko?”

La Vero diras: “Mi ja malĝojas pro tio, ke oni emas manĝi sukertegitan venenon. Sed via venko estas portempa. Se la tempo malkaŝos vin, vi do povos kaŝi vin nenie.”





Budhostatuoj altiras turistojn.

HU YUN:

## En la hejmloko de Granda Budho

**A**NTAŬ 1 200 jaroj bonzo Hai Tong vojaĝis al kunfluejo de la riveroj Dadu, Minjiang kaj Qingyi. Tie li vidis, ke la ondanta akvo sin ŝetas kontraŭ la rok-monton, dronigas ŝipojn kaj englutas homojn, kaj decidis elĉizi en la monto budhan statuon, por ke la senlima povo de la budho mildigu la akvan torenton, jugu la furiozajn ondojn kaj protektu la estaĵojn.

Dank' al penado de kelkaj generacioj en 90 jaroj, la ŝtona Majtrejo estis elĉizita sur la monto. Tio ja estas la Granda Budho de Leshan-monto, fama pro sia grandeco kaj majesteco.

Leshan-monto situas en Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. La loko estas aspirata de multaj piaj budhistoj, ĉar tie estas hejmloko de la Granda Budho kaj kuŝas budhisma sanktejo Emei-monto. Kiel majstro-verko de la vidindejoj de Ĉinio, la loko estas ideala por turistoj ĉinaj kaj alilandaj. En 1993 rapide disvolviĝis la turisma afero de Leshan. Tiujare la lokon vizitis sume 5.55 milionoj da turistoj. Maje de 1994, inaŭguriĝis la internacia turisma festivalo de la Granda Budho. La leshan-anoj kun etenditaj brakoj bonvenigis turistojn el ĉiuj partoj de la mondo.

Tie la turistoj volas viziti antaŭ ĉio la Grandan Budhon. Kvankam mi ne estas budhista, tamen kiam mi iris laŭ la kornica vojo ĉirkaŭanta la monton kune kun aliaj vojaĝantoj kaj atingis la montpiedon, la majesteco de la budho mirigis ankaŭ min. Ĉiĉeronino diris al mi, ke la Granda Budho kun 1 021 hartuberoj sur la kapo altas 71 metrojn. La budho kun harmoniaj vizaĝtraĵoj aspektas aminde. Tamen starante sur ĝia piedo oni ne povas klare vidi ĝin en la tuto kaj en la okuloj de la turistoj verŝajne ĝi havas nur paron da piedoj. Sur ĝia pieddorso povas sidi 100

homoj samtempe.

Sur rivero antaŭ la budha statuo oni povas ne nur rigardi la statuon en la tuto, sed ankaŭ havas senton eksterordinaran. Oni povas rigardi la statuon ankaŭ de sur Fengzhou-insulo en la rivero. Per kablotramo oni povas atingi la insulon nur en 10 minutoj. La solena inaŭguro de la festivalo okazis sur la insulo. Turisma servo de Leshan starigos tie budhokultan terason kaj konstruos aliajn vidindejojn por fari ĝin ampleksa turisma loko.

En Leshan estas sida budho, la plej granda en la mondo, kaj ankaŭ kolosa kuŝa budho. Antaŭ 5 jaroj, iu maljunulo el Guangdong-provinco vojaĝis tien kaj faris foton. Sur la foto li trovis ion miraklan. La tri kontinuaj montoj formis kolosan budhon, kiu kuŝas sur la montoj kun versimilaj vizaĝtraĵoj. Oni ne scias, ĉu tio estas subita montriĝo de la budho, kiu kaŝiĝas inter la arboj, aŭ la naturo tiel mirige formis la statuon. Homoj torentis tien por viziti la kuŝan budhon. Dank' al tio la loko refoje faris sensacion en la tuta lando.

Leshan estas riĉe naturdotita de budha kulturo. Nun vidiĝas tie rudimento de la Orienta Budha Urbo projektita de pentristo Wan Yibin. La vidindejo kun dorso al la Granda Budho koncentre montras la kvintesencon de la budhisma skulpturo de Ĉinio kaj sudorienta Azio. Ĝi konsistas el 3 000 budhaj statuoj sur la monto kontraŭ la Granda Budho. Krom tio en Leshan konstruiĝis ankaŭ Budhorigarda Turo, Budha Paradizo k.a.

Tie estas fama ankaŭ la bela Emei-monto, budhisma sanktejo, je 39 km for de Leshan. Okcidente de Emei-monto troviĝas mirinda Wawu-monto. La Granda Budho de Leshan, Emei-monto kaj Wawu-monto kune formis la triangulan turisman lokon en la sudokcidenta parto de Sichuan-provinco. ■



La pagodo Dayan kun historio de 1 000 jaroj

# Antikva urbo de Ĉinio

Fotoj de LI CHUNGENG

Parto de la antikva urbo Xi'an







En foiro de antikvaĵoj

Xi'an (Ŝji'an), konata kiel unu el la 4 grandaj antikvaj urboj de la mondo, estas fama ĉina kultura urbo kun longa historio. Antikvece ĝi portis la nomon Chang'an (Ĉang'an). Sidante interne de la ĉina kontinento, ĝi estas trafika nodo liganta la orientan, okcidentan kaj sudokcidentan partojn de Ĉinio. Ĝi konstruiĝis en la 11-a jc., kaj poste 73 imperiestroj de 13 dinastioj prenis ĝin kiel ĉefurbon. Abunda je historiaj restaĵoj, ĝi estas ideala loko por turistoj. Tie troviĝas terakotaj militistoj kaj ĉevaloj elterigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin(Ĉin)-dinastio rigardataj kiel la oka miraklo de la mondo, antikva urbo konstruita sur la bazo de la imperiestra urbo de Tang-dinastio (617-907) en la komenca periodo de Ming-dinastio (1368-1644), la Muzeo de Banpo, kiu konstruiĝis sur la ruino de la primitiva vilaĝo apartenanta al la matriarka klana komunumo, Granda Moskeo kun kvin kortoj, la fosata kavo n-ro 2 kun terakotaj militistoj kaj ĉevaloj entombigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio... Ĉio tio allogas multe da turistoj. En la lastaj jaroj la rilata departemento de Xi'an konstruis per granda sumo da mono restoraciojn, hotelojn kaj vendejojn kaj pretigis aŭtomobilojn por servigi ilin al turistoj ĉinaj kaj alilandaj.

Parko ĉe la urbomuro




Alilandanoj en la Granda Moskeo





# Yueyang en rapida disvolviĝo

de JI PING



Kajo de Yueyang

**A**NTAŬ duonjarcento la historia urbo Yueyang (Jŭejang), ĉe Dongting-lago en nordorienta Hunan-provinco, havis nur 20 mil loĝantojn. Hodiaŭ, dank' al la reformado kaj pordmalfermo, ĝi disvolviĝis en industriar urbon kun 4.8 milionoj da loĝantoj kaj areo de 15 000 kvadrataj kilometroj. En la pasintaj dek jaroj la ekonomio de la urbo disvolviĝis plej rapide en la provinco kaj en 1993 la produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de Yueyang estis 17 miliardoj da juanoj, 6.8-oble de tiu en 1978. Kaj per tio ĝi enviciĝis inter la antaŭirantoj de pli ol 20 mezgrandaj urboj ĉe Yangzi-rivero.

## AVANTAĜOJ POR DISVOLVI EKONOMION


Kial rapide disvolviĝis la ekonomio de Yueyang? Laŭ la opinio de urbestro Ouyang Song (Oŭjang Song), krom al la praktiko de reformado kaj pordmalfermo, oni atribuis tion ankaŭ al la avantaĝoj geografia, trafika kaj riĉfonta kaj solida industria bazo.

Yueyang situas en la loko, kie renkontiĝas Yangzi-rivero, Dongting-lago kaj la Pekin-Kantona Fervojo kaj etendiĝas la limo inter la provincoj Hunan, Hubei kaj Jiangxi (Ĝjangŝji). Kontraŭ la fluo de Yangzi-rivero atingeblas Chongqing de Sichuan-provinco kaj laŭ la fluo — Ŝanhajo. La konstruata Chenglingji-haveno estas unu el la ok grandaj havenoj de Yangzi-rivero. Se oni veturas tie laŭ Dongting-lago kaj kontraŭ la fluo de Miluo-, Xiangjiang-, Zishui-kaj Yuanjiang-riveroj, oni povas

atingi 100 urbojn kaj guberniojn de Hunan.

Kiel nova industria urbo, Yueyang havas rudimentan formon de la sistemo de industrioj petrol-kemia, tekstila, elektra, maŝina, konstru-materiala kaj manĝaĵa. En la 30-kilometra regiono laŭ la rivero, lago kaj Pekin-Kantona Fervojo estas la Changling-a Petrolo-rafina Fabriko kaj aliaj tiaj entreprenoj sub la Baling-a Petrol-kemia Kompanio, kies produktovaloro konsistigas 63% de tiu de la pro-

## SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



1. Yueyang




Foto de **HU QINGMING**

vinco.

En Yueyang abundas riĉfontoj. Tie troviĝas pli ol 200 minoj de oro, argento, nafto k.a., sume 90 specoj, kiuj plejparte dissemiĝas ĉe la rivero kaj fervojo. La prospektorado farita ĉe Dongting-lago montras, ke la tiea rezervita kvanto de nafto estas 50-100 milionoj da tunoj.

Dongting-lago, la dua granda dolĉakva lago de Ĉinio, abundas je fiŝoj kaj fragmitoj. Ĉirkaŭ ĝi produktiĝas greno, kotono, oleo, teo, porkoj, kortobirdoj ktp. Yueyang jam fariĝis grava bazo de agrikulturaj produktaĵoj, tekstilaĵoj kaj papero kaj ankaŭ tiu de prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Ĉe Dongting-lago estas rami-tekstila fabriko, la plej granda en Azio, kaj paperfabriko, la plej granda en Hunan.

## VENIGI EKSTERLANDAJN INVESTANTOJN

Por rapidigi la praktikon de reformado kaj pordmalfermo Yueyang ĝemeliĝis kun la urbo Numazu de Japanio, Taylorsville de Usono kaj Castelka de Kanado kaj kunlaboris kun 28 landoj kaj regionoj en ekonomio kaj tek-

niko. Ĝi havas pli ol 240 entreprenojn investitajn de aliaj landoj kaj utiligis alilandan kapitalon de 680 milionoj da usonaj dolaroj. Tiuj entreprenoj gajnis profiton. Ekz., la Chiatai-Yueyang-a Limigita Korporacio, kune funkciigata de Yueyang kaj Tajlandaj Grupo-Kompanioj de Chiatai, kiel brutonutraĵa fabriko, havis investaĵon de kvar milionoj da usonaj dolaroj. Post kvin jaroj ĝia produktovaloro atingis 214 milionojn da usonaj dolaroj. La entrepreno jam fariĝis kombinato de brutonutraĵo, bredado kaj viando-prilaborado.

Por disvastigi kunlaboron kaj gajni pli multe da alilandaj investoj, en la pasintaj jaroj Yueang penis por plibonigi la investomedion. Ekfunkciis la Huaneng-a Elektrejo kun kapacito de 700 mil kilovattoj, 150-kilometra ŝoseo de Yueyang ĝis Huanghua-flughaveno de Changsha, la ĉefurbo de la provinco kaj program-regata telefonio kun 35 000 lineoj. Ekfunkcios ne longe poste la nova stacidomo kaj du por 5 000-tonelaj ŝipoj en dokoj de Chenglingji-haveno. Stratotoj de la urbo estas larĝigataj kaj novaj konstruaĵoj streĉe farataj.

La 52-jara urbestro Ouyang Song diris, ke junio de 1992 Yueyang estis difinita de la ŝtato kiel unu el la malfermitaj urboj ĉe Yangzi-rivero, kaj la registaro de Hunan-provinco decidis fari Yueyang bona ekzemplo por akceli la kunlaboron en porsktera ekonomio de la provinco. Pro tio Yueyang ellaboris la ĝeneralan projekton "Prosperigi la urbon per pordmalfermo". Je la fino de la kuranta jarcento Yueyang fariĝos petrol-kemia, tekstila kaj energia bazo, sinteza bazo de agrikulturaj produktaĵoj, fama turisma loko, eksterakomerca haveno de la provinco kaj komerca centro en la meza baseno de Yangzi-rivero.

## ANTAŬIRANTO DE EKO-

## NOMIA EKSPLUATADO

La Ekonomia Ekspuata Distrikto de Chenglingji, fondita januare de 1991, estas antaŭiranto de Yueyang por malfermi la pordon al aliaj landoj. La ĉefa tasko estas disvolvi altteknikajn kaj poreksportajn entreprenojn. La distrikto sidas nordoriente de la urbo, ĉe Dongting-lago kaj Yangzi-rivero kaj apud la Pekin-Kantona Fervojo. Nun ĝi havas areon de 9.8 kvadrataj kilometroj kaj estonte 30. En la distrikto 280 projektoj estas sankciitaj. Inter ili 92 estas funkciigataj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kun investo de 65.85 milionoj da usonaj dolaroj. Estas konstruataj la Zhongchen-a Ceramikaja Limigita Kompanio, investita de Ĉinio kaj Italio, Ekspuata Domego, investita de ĉinaj kaj Hongkong-aj komercistoj, kaj aliaj dekoj da projektoj. Ankaŭ instalaĵoj financaj, komercaj, doganaj kaj amuzaj estas en konstruado.

## TURISMAJ RIĈFONTOJ EN EKSPLUATADO

Ekspuata de la Turisma Loko Nanhu estas alia grava paŝo de Yueyang por pordmalfermo. La lago Nanhu troviĝas sude de la urbo kaj okcidente interkomunikiĝas kun Dongting-lago. Tie regas kvieteco kaj ĉarmas la pejzaĝo. La magistrato difinis ĝin kiel regionon de la drakboata kulturo.

Miluo-rivero ĉe Dongting-lago estas la lulilo de la drakboata kulturo de Ĉinio. La 5-an de la 5-a monato de 278 a.K. laŭ la luna kalendaro la fama ĉina patriota poeto Qu Yuan (Ĉju Jŭan), plena de malĝojo pri la stato de sia patrulando, dronigis sin en ĝi. Informiĝinte pri tio, Chu-regnanoj triste veturigis drakboaton por elakvigi lin, plenigis bambuajn tubojn per rizo kaj enakvigis ilin por kulti Qu Yuan. Poste, la dato fariĝis la Drakboata Festo. Por memorigi pri Qu Yuan, en tiu



Parto de Yueyang

Foto de XIE JINTING

tago oni veturas per drakboato kaj manĝas *zongzi*-ojn el glueca rizo. Nun la drakboata konkurso jam furoras ĉie en Ĉinio, Japanio, sudorienta Azio kaj iuj landoj de Eŭropo kaj Ameriko. En 1991, sur Nanhu-lago okazis la Unua Internacia Drakboata Fes-


tivalo, kiu de tiam okazas ĉiujare.

Yueyang havas historion de 2 500 jaroj kaj 193 historiajn vidindejojn. Yueyang-turo ĉe Dongting-lago imponas kun aparta stilo. Ĝi, la Turo Flava Gruo en Wuhan kaj Turo de Princo Teng en Nanchang estas honori-


taj kiel tri famaj turoj sude de Yangzi-rivero.

Nun disvastiĝas la turisma loko kun Yueyang-turo kiel la centro. Surgrimpinte la turon, oni povas ĝui stelearon, poemojn kaj kaligrafiaĵojn de antikvuloj. ■





En la Changling-a Petrol-rafinejo Foto de **YUE XUAN**



Drakboata konkurso

Foto de **YUE XUAN**

La Ekonomia Ekspluata Distrikto de  
Chenglingji en konstruado  
Foto de **ZHANG CHANGJIANG**



Yueyang-turo ĉe Dongting-lago

Foto de **YUE XUAN**



### Aforismoj de Tang Zhen

*Tang Zhen (Tang Ĝen) estis kleriga pensulo de Ĉinio en la dua duono de la 17-a jarcento. Dek monatojn post kiam li fariĝis guberniestro, li estis degradita pro kritiko al la tiamaj malbonaj politikoj. Poste li verkis filozofiajn librojn. Inter ili estas la 300-000-ideograma libro "Qianshu". Li klare vidis la suferojn de la popolo. Li staris kontraŭ kruelaj politikoj kaj por disvolvo de ekonomio kaj riĉigo de la popolo.*

Se ŝtatoficistoj ne tordas sian popolon,  
La lasta ne dronos en malriĉeco.

La superuloj prenu riĉigon de la popolo kiel  
meriton,  
La subuloj prenu riĉigon de la popolo kiel devon.

La plej granda damaĝo estas malversacio.

Vermoj mortigas arbon,  
Furunkoj difektas la homan korpon.

Bonaj regantoj devas aŭskulti la voĉon de la  
popolo,  
Kaj por tio ili nepre devas proksimiĝi al la lasta.

Homoj dirantaj la veron estas bona medikamen-  
to de la ŝtato,  
Korteganoj dirantaj la veron estas ĝiaj bonaj  
kuracistoj.

Superuloj facile fieriĝas,  
Subuloj facile flatas.

Ĉiu bono havas sian malbonon,  
Ĉiu malbono havas sian bonon.

## MEM PROUVU

### NE SALU LEGOMON FRUE DUM LA KUIRADO

Legomo estas rapide kuirita pro varmigo. Se vi tro frue salas legomon, do akvo en ĝi eligiĝas kaj ĝi malrapide kuiriĝas. Prefere vi salu ĝin tuj antaŭ ĝia kuiriĝo.

### PSIKO KAJ VIDKAPABLO

En la pasintaj jaroj oftalmologoj trovis, ke la malfortigon de la vidkapablo de du trionoj de la geknaboj koncernas la psika faktoro. Ekz., nebona familia medio malaltigas la vidkapablon de infanoj. Se la gepatroj malkonkordas kun siaj infanoj aŭ malbone traktas ilin, tio ne bone influos ilian vidkapablon. Bedaŭrinde, la

damaĝo, kiun suferas la antaŭlernoaĝaj infanoj, estas facile neglektebla.

Patologiaj ŝanĝiĝoj de la retino kaj koroido ofte okazas ĉe plenaĝuloj. Povas esti, ke la vidkapablo de la malsanuloj evidente malaltiĝas. Tiu okulmalsano strikte rilatas kun psika faktoro. Laŭ statistiko, pli ol 90% de la okulmalsanuloj havis psikan traŭmaton, antaŭ ol suferi la okulmalsanon. Post kiam ili ricevis psikoterapion, multaj el ili resaniĝis. Nur malmultaj ne resaniĝis post longtempa kuracado. Tial oni devas laŭeble teni sin en bona psikostato.

### TAGMEZA SPORTO UTILAS AL LA KORPO

Duonhora rapida irado en tag-

mezo ege refreŝigas homojn kaj ili ne laciĝas en posttagmeza laboro. Kaj plie, la tagmeza sporto eksterdome estas multe pli bona ol restado en la oficejo.

Statistiko pri 3 600 laboristoj kaj oficistoj el 25 entreprenoj diras, ke la procento de la malsanuloj kun altkolesterolo por la laboristoj, kiuj rapide iras du kaj duonan horojn semajne, estas je 50% malpli granda ol tiu por la laboristoj, kiuj ne faras tion. Se oni rapide iras 20-30 minutojn, trifoje semajne, tio utilas por plifortigi la cirkulan sistemon, malhelpi la kreskon de la korpopezo kaj preventi la malsanon de osteo-  
ca lozo.

# Pentraĵoj de Min Xuelin

de WEI CHUAN



S-ro Min Xuelin

**S**-RO Min Xuelin estas mezaĝa pentristo lerta en pentrado de floroj kaj birdoj. Edifite de la familio en sia infanaĝo, li estis instruata de majstro de kaligrafado kaj pentrado kaj rapide progresis en arto. Meze de la 70-aj jaroj li sukcesis en la ekza-


meno por eniri en la Zhejiang-an Belartan Instituton. Diplomitiginte li ekfunkciis kiel instruisto en la instituto kaj nun estas ĝia profesoro. Antaŭ nelonge la instituto ricevis la nomon Ĉina Belarta Instituto. Ĝi estas fama supera belarta lernejo en Ĉinio. Nemalmultaj famaj ĉinaj pen-

tristoj diplomitiĝis aŭ instruis en ĝi.

En siaj studentaj jaroj s-ro Min studis ĉefe pentradon de floroj kaj birdoj kaj magistriĝis al la fakultato de la ĉin-stila pikturo. La solida ekzercado pri fundamentaj kapabloj pretigis la vojon por lia arta verkado, kaj oni atribuis liajn sukcesojn al lia diligenteo. En la pasintaj dekelkaj jaroj li sin okupis per verkado kaj faris multe da pentraĵoj. Dank' al tio formiĝis liaj artaj trajtoj.

En Ĉinio estas multaj pentristoj de floroj kaj birdoj. Iuj el ili estas lertaj en farado de delikatlinaj pentraĵoj, aliaj, kiel liberstilaj pentristoj, montras sian stilon en uzado de ĉina inko. La pentraĵoj de s-ro Min karakteriziĝas per trajtoj de ili ambaŭ. Kaj ili plejparte estas belkoloraj, klaraj kaj okulplaĉaj. Sed pli grave estas, ke en liaj okuloj la floroj kaj birdoj estas liaj amikoj kun vivfortoj. Liaj pentraĵoj celas montri la interfluan de homaj sentoj kaj naturaj estaĵoj. Li penas krei la puran, novan kaj viveplenan mondon de floroj kaj birdoj. En tiu mondo lia vivo estas purigita. Li donas kulturan sencon al la ekzisto, konceptoj kaj spertoj de la vivo kaj kreas signifoplenan kaj pacan medion.

"Peonio"







“Umeffloroj”

“Fiŝoj kaj verdaĵoj” estas bela pentraĵo. Sur ĝi prosperas verdaĵoj, apud kiuj libere naĝas en akvo ruĝaj fiŝoj. Sur la pentraĵo “Umeffloroj” belas la floroj en frosta vintro. La pentraĵo edifas la rigardantojn per eleganco kaj braveco.

Peonioj estas ofte vidataj sur ĉin-stilaj pentraĵoj. Sub la peniko de ordinaraj pentristoj ili estas nur ĉarmaj, sed “Ruĝa peonio” pentrita de s-ro Min Xuelin ja

estas originala. Per strekoj de rapidega manskribado de la ĉina kaligrafio li pentris bambuan heĝon kiel fonon de la pentraĵo. Sur la fono prosperas peonio. Per kontrasto de sekeco kaj humideco, densa nigro kaj pimpa koloro li faras la pentraĵon harmonia. El la tradicia pikturo oni vidas modernajn karakterizaĵojn. En simpleco vidiĝas senbrideco. La de li pentritaj malgrandaj birdoj flugantaj kontraŭ vento,


agloj super alta monto kaj freŝaj lotusfloroj ĉiuj impresas profunde.

Kompreneble, s-ro Min strebas al arta beleco. Tamen la de li ĉasata beleco ne estas softa memebriiĝo, sed kombiniĝo de la forta amo kun la vivo de la naturo. Oni povas diri, ke en la mondo de liaj floroj kaj birdoj estas ritmo kaj ĝi ne estas delikata serenado, sed kuraĝiga simfonio. ■



Ventumil-ekrano kun bildo de lotusfloroj

“Flugado kontraŭ vento”



“Fiŝoj kaj verdaĵoj”



## AMATOROJ MULTĜANTAJ EN ĈINIO

En la lastaj jaroj amatoroj pli kaj pli multiĝis en Ĉinio kiel fungoj post pluvo. En la pasinteco kuriozaĵoj, kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj libroj estis kolektitaj nur de literaturistoj kaj riĉuloj, sed ne de ordinaraj popolanoj. Hodiaŭ, kune kun la disvolviĝo de la socia ekonomio kaj kulturo, ordinaraj homoj komencis sin turni al kultura konsumo.

Jam antaŭ kelkaj jaroj subite febris popola kolektado de filatelajoj, antikvaj moneroj, markoj de vinoj, ĉinaj kaj alilandaj ĵurnaloj kaj antikvaj horloĝoj. Laŭ nekompleta statistiko, Pekino havas 400 000 amatorojn kaj Ŝanhajo pli multe, kaj ili kolektas ĉiaspecajn kuriozaĵojn.

En Ŝanhajo estas mezaĝa viro, nomata "Reĝo de Purpura Fajenco". En la vitritaj palisandraj ŝrankoj ĉe la muroj de lia 40-kvadratmetra salono estas montrataj miloj da kruĉoj el purpura fajenco, rondaj kaj kvadrataj, altaj kaj plataj, grandaj kiel sitelo kaj malgrandaj kiel juglando. Foje iu japana amato ekŝatis lian "kruĉon de magnato" faritan de majstro kaj volis aĉeti ĝin kontraŭ 70 000 usonaj dolaroj, sed la viro diris kun rideto: "Ĝi estas ĉina trezoro. Mi konservas ĝin ne por vendo. Mi ne vendos ĝin, eĉ se vi pagos milionon da usonaj dolaroj."

Iu ĉina historiisto kolektas nur antikvajn ventumilojn kaj tuĉfrotajn slabojn. En la pasintaj dek jaroj li kaj liaj tri fratoj kvar-foje donacis al la ŝtato la de ili konservitajn 706 kopiojn de steleaj surskriboj, 200 000 ekzemplerojn da klasikaj libroj kaj grandan kvanton da palisandraj mebloj kaj tuĉfrotaj slaboj, kiuj ĉiuj estas historiaj objektoj de ŝtata nivelo.

Kompreneble, tia kolektado iras ĉefe pro intereso kaj estas ankoraŭ malproksima al la altgrada kolektado, kiu kun bonaj materialaj kondiĉoj, celas por sisteme studi iun kulturon.

## ANTIKVAJ ĈINAJ SCIENCŬOJ KAJ TEKNIKOJ

Kompaso, pulvo, paper-farado kaj tipografio estas antikvaj ĉinaj inventoj vaste konataj. Krom ili, estas ankaŭ multaj aliaj ĉinaj inventoj, ekzemple:

Fajencaĵo. Jam antaŭ 7 800 jaroj loĝantoj de nordokcidenta Ĉinio sciis fari fajencaĵojn ruĝajn kaj grizajn en diversaj formoj.

Utiligo de sunenergio. Jam antaŭ 3 000 jaroj Ĉinio havis la teknikon utiligi sunenerĝion.

Muldado. Jam en la antikveco Ĉinio uzis argilon, feron kaj vakson por muldado.

Eltrovo de oksigeno. Jam en la antikveco ĉinoj malkovris oksigenon en alkemio.

Fizika laboratorio. Jam en la antikveco Ĉinio havis laboratorion de son-vibrado.

Lumo. Jam en 250 a.K. Ĉinio sciis fari latunan lanternon kaj ŝanĝi ĝian lum-intenson.

Termometro. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.) ĉinoj inventis termometron en formo de pesilo.

Giroskopo. Jam en la Orienta Han-dinastio (25-220) ĉinoj uzis giroskopon en mar-navigado.

Horloĝo. En la Orienta Han-dinastio Zhang Heng (Ĝang Heng) inventis horloĝon, la plej fruan en la mondo.

Tekniko de boro. Jam en la 11-a jarcento ĉinoj kreis teknikon bori truon pli ol 200 metrojn profundan.

Malkovro de ŝton-oleo kaj ĝia nomiĝo. Jam en la Orienta Han-dinastio ĉinoj malkovris ŝton-oleon kaj poste en la Norda Song-dinastio (960-1127) sciencisto Shen Kuo difinis ĝian nomon.

Teromagnetismo. Shen Kuo, je 400 jaroj pli frue ol eŭropanoj, malkovris, ke teromagnetismo kliniĝas al sudo.

Termomekanismo. La plej frua termomekanismo estas turniĝanta lanterno aperinta antaŭ la Norda Song-dinastio.

Monbileto. Kiel la unua emisiinto de paper-mono, Ĉinio emisiis tian monon en Sichuan-provinco, en la Norda Song-dinastio.

Tekniko de raketo-farado. Jam en Song-dinastio (960-1279) Ĉinio faris "ĉielan kanonon", kio prezentis teknikon de la nuntempa raketo.

## MALSANOJ KURACEBLAJ PER MANĜAĴOJ

Ĉinoj ofte diras, ke "malsanoj eniras tra la buŝo", kio estas ŝajne kontraŭdira al la diro "malsanoj kuraceblaj per manĝaĵoj". Ĝuste en tio kuŝas diferenco inter la ĉina dieta kulturo kaj la okcidenta nutrologio kaj la diro baziĝas sur spertoj kaj teorioj el la kelkjarcenta praktiko de la ĉina medicino.

Jene estas ĉefaj teorioj:

1. Sama fonto de drogoj kaj manĝaĵoj. La antikva farmakopeo "Shennong Bencao Jing" diras, ke drogo kaj manĝaĵo estas nedisigeblaj. Ekzemple, en la libro estas notitaj jujuboj kaj lilio-bulboj kiel drogoj. En la ĉin-medicina apoteko oni vendas abrikotajn kernojn kaj kragtagajn fruktojn. Tio pruvas, ke ĉinaj drogoj kaj manĝaĵoj venas el sama fonto.

2. Samaj karakteroj de drogoj kaj manĝaĵoj. La ĉina medicino opinias, ke manĝaĵoj, same kiel drogoj, havas varmecon, malvarmecon, dolĉecon, maldolĉecon, acidecon, pikecon kaj salecon. Ekzemple, umeo estas acida kun varmecon, sinapo pika kun mildeco, kokaĵo dolĉa kun varmecon kaj krabo sala kun malvarmecon.

3. Samaj kuracaj teorioj de drogoj kaj manĝaĵoj. Ĉar drogoj kaj manĝaĵoj havas samajn karakterojn kaj saman metodon de konado, ili devas havi samajn kuracajn teoriojn. Jes, oni povas kuraci malsanojn de malvarma simptomo per drogoj aŭ manĝaĵoj kun varmecon kaj kuraci malsanojn de varma simptomo per drogoj aŭ manĝaĵoj kun malvarmecon. La ĉin-medicina kuraca principo "kuraci varmon per malvarmo, malvarmon per varmo, feblecon per toniko kaj eksceson per reduktado" ludas gvidan rolon por manĝaĵoj.

4. Kombino de drogo kaj manĝaĵo. Nun estas tre bona tonika plado kun drogo, kiu furoras dank' al la ĉin-medicina teorio. Tia plado havas pli grandan kuracan efikon ol la drogo mem. La kombinita plado estas sekura, facile preparebla kaj tre efika.



# Strato de fiŝhaveno

Teksto kaj fotoj de YAN JIN



Bingang-strato ĉe maro

Shenĵiamen (Ŝenĝjamen), urbeto sur insulo, estas la plej granda fiŝhaveno de Ĉinio kaj unu el la 3 grandaj fiŝhavenoj de la mondo. En sezono de fiŝkaptado dekmiloj da fiŝboatoj veturas tien de la ĉinaj ĉemaraj provincoj. Sur la tiama maro arbare staras mastoj kaj en vento flirtas diverskoloraj flagoj.

Kun totala areo de nur 27.67 kvadrataj kilometroj kaj apenaŭ 90 000 loĝantoj, Shenĵiamen troviĝas sudoriente de Zhoushan (Goŭŝan)-insularo, Zhejiang (Ĝeĝĵang)-provinco. En ĝia sudorienta parto etendiĝas la 4-kilometra Bingang-strato. Sude de ĝi estas maro kaj norde de ĝi etaĝdomoj unu apud alia. Ĝi estas ĉefa komerca strato de la urbeto. Ĉe ĝi servas diversaj magazenoj, restoracioj, dancejoj, luksaj hoteloj kaj butikoj destinitaj por fiŝretoj kaj aliaj objektoj bezonataj de fiŝboatoj. La trafiko viglas de mateno ĝis vespero. La klientoj en akvoproduktaĵa bazaro plejparte estas lokanoj, komercistoj el aliaj lokoj kaj turistoj, kaj tiuj en magazenoj plejparte estas fiŝistoj, kiuj ŝatas fari aĉeton aŭ promeni en grupoj.

Vespere Bingang-strato estas plej movoplena kaj ĉarma: brilas steloj en la ĉielo kaj buntaj lampoj en kaj ekster magazenoj kaj en la maro lumas lampoj de fiŝboatoj. Tio konsistigas naturan bildon, kiu speguliĝas en la maro kaj varias laŭ ondanta marakvo kiel mirindaj vidaĵoj. Muziko el dancejoj aldonas ĉarmon al la vespero.

Kiam venis vespero, aperis sur la marbordo dekoj da moveblaj budoj, antaŭ kiuj staras tabloj plenaj de diversaj fiŝoj, salikokoj kaj konkuloj. Tio estas vespera foiro de marproduktaĵaj manĝaĵoj kun loka koloro. Gustumante ilin, oni admiras la belan vesperon de la fiŝhaveno.




Plektado de fiŝreto


En bazaro de marproduktaĵoj



Vespera foiro de marproduktaĵaj manĝaĵoj








Fiŝistaj knabinoj post aĉetado

Taksioj sur la strato





# PRI GRASAJ INFANOJ DE ĈINIO


de ZHANG QINGZHEN

**E**N nemalmultaj ĉinaj urboj oni povas vidi grasajn infanojn. Nun multaj ĉinaj gepatroj dorlotas siajn solinfanojn kaj lasas ilin tro multe manĝi, ke ili grasiĝas kaj devas viziti kuracistojn. La trograseco de infanoj jam fariĝis problemo atentata de la socio kaj lernejoj.

## AFIŜO KAPTAS LA ATENTON

Mi aŭdis novaĵon en la Pekina Infana Hospitalo: la hospitalo planis organizi vintran tendumadon por malpli ol 40 grasaj infanoj, sed unu tagon post la apero de la afiŝo en ĵurnalo pli ol 100 infanoj venis al la hospitalo por sin anonci kaj pliaj 100 en la sekvanta tago. La organizanto devigite anticipe ĉesigis la sinanoncadon, sed ankoraŭ venis gepatroj kaj instruistoj unu post alia. Tiam vicdirektoro de la hospitalo Hu Yiji (Hu Jiĝji) diris: "Mi kaj ĝojas kaj ĉagreniĝas pro tia situacio. Mi ĝojas, ke iuj gepatroj ekkonsciis, ke trograseco de infanoj estas malsaniga kaj forlasis la malnovan koncepton, ke graseco signifas sanon. Mi ĉagreniĝas, ke trograseco de infanoj jam estas ofta socia fenomeno kaj ĝi ne nur malutilas al la sano de infanoj kaj alportas ĉagrenon al iliaj familioj, sed ankaŭ kaŭzos serion da sociaj problemoj."

Specimena statistiko montras, ke 1% de la ĉinaj infanoj en la aĝo de malpli ol 4 jaroj fariĝis tro grasaj, la procentaĵo en norda



Ekzamenado de la korpo

Ĉinio estas pli alta ol tiu en la suda, kaj la procentaĵo en la urboj estas pli alta ol tiu en la kamparo. En iuj lokoj 10% de la 10-12-jaraj geknaboj estas tro grasaj. Kaj la nombro de la grasaj geknaboj vizitintaj la Pekinan Infanan Hospitalon en la pasintaj du jaroj egalas al la totala nombro en la pasintaj dek jaroj.

## ĈU AMO AŬ KULPO?

Foje mi interparolis kun la patro de iu grasa infano. Li diris: "Nun solinfano estas trezoro de sia familio. Kio estas bongustega, tion li manĝas. Ifoje mi volis doni ne tiom multe da manĝaĵo

al li, sed liaj geavoj malkonsentis. Ĉiufoje, kiam li revenis hejmen de la lernejo, li tuj prenis manĝon kaj vespere, kiel kutime, manĝis kun la familianoj. Antaŭ la dormo li refoje ion manĝis. Mirinde, se li ne grasiĝus!"

La patrino de iu grasa infano ĉagreniĝis: "Antaŭe mi opiniis, ke ju pli multe mia infano manĝas, des pli sana kaj aminda li fariĝas. Mi ĉiam lasis lin manĝi laŭplaĉe. Nun mia grasa infano eĉ ne povas bone kuŝi. Li malfacile sin movas kaj tio influas lian lernadon. En tio mi kulpas."

La fakto pravas, ke troa manĝo kaŭzas grasecon. Plejparto de la

infanoj havas bonan apetiton, sed mankas al iliaj gepatroj scienca direktado de ilia manĝado. Do kion la infanoj ŝatas, tion ili manĝu laŭvole, kiel eble plej multe. Ĝenerale, dolĉaj kaj frititaj manĝaĵoj estas plej ŝatataj de ili. Iuj infanoj denaske malfortaj ne emas manĝi, kaj mankas al ilia korpo elementoj, kiaj fero kaj zinco. Tial iliaj gepatroj vizitas ĉiajn kuracistojn por bonigi ilian apetiton. Kiam la infanoj ekŝatas manĝi kaj peziĝas ilia korpo, nature iliaj gepatroj tre ĝojas kaj lasas ilin manĝi ekscese.

## GRANDA PROBLEMO

Tiuj gepatroj ne atendis, ke iliaj grasaj infanoj povas fariĝi peza ŝarĝo de la familio. Trograseco minacas la sanon, atakas la psikon kaj eĉ malhelpas la disvolvon de la intelekto de infanoj.

Kuracisto Du Zhongmin (Du Gongmin), kiu studas infanajn problemojn, diris al mi, ke ĝenerale grasaj infanoj suferas altan sanggrasecon, malfortan funkcion de pulmoj aŭ koro, grasan hepaton, artriton kaj anomalion de kruroj. Cetere, ĉar la korpa supraĵo de grasa infano estas tro vasta, mankas oksigeno al lia sango, kaj lia cerbo ofte estas en la oksigenmanka stato. Iuj estas dormemaj

En somera tendaro



kaj aliaj stultaj, tial tiaj infanoj ĝenerale ne povas fariĝi eminentaj lernantoj.

Trograseco ne nur estas kaŭzo de iuj malsanoj, ĝi mem estas fatala malsano. Iu 9-jara 90-kilogramo knabo mortis tri tagojn post sia enhospitaliĝo pro sindromo de malfacila spirado, kaŭzita de premo de tro multe da graso sur liaj pulmoj kaj koro. Tial pulmito kuracebla por ordinara infano fariĝis fatala por li.

Trograseco kaŭzas ankaŭ psikan perturbon al grasaj infanoj. Ili diris sian ĉagrenon al kuracisto Du. Iuj ne povis partopreni sociajn aktivadojn de ordinara infanoj, aliaj estis riproĉitaj de siaj kunlernantoj pro tio, ke iliaj malfaltaj poentoj en sporto influis la totalan poentaron de la kurso. Iu grasa lernantino ne povis viziti sportan kurson dum du jaroj. Ŝi ne povas toleri, ke oni rigardas ŝin kiel monstron. Ĉiutage ŝi la lasta foriras de la lernejo, ĉar tiam surstrate ne estas multaj pasantoj. Multaj grasaj infanoj havas la saman senton.

Kuracisto Du diris: "Trograseco psike suferigas infanojn multe pli ol fiziologie. Kvankam tia influo estas eble ne tuj rimarkebla, tamen ĝi malhelpas la disvolvon

de la temperamento, karaktero kaj kapablo de infanoj."

## PRESKRIBO POR MALGRASIGO

La infan-eduka kaj infan-sanprotektaj departementoj klopodas por trovi sciencajn metodojn de malgrasigo. Nun porinfanaj vintra kaj somera tendaroj organizitaj de hospitalo kaj lernejo estas bonaj provoj.

S-ro Ding Zongyi, estro de la nutrologia sekcio de la Pekina Infana Hospitalo, diris al mi: "Malgrasigo de infanoj estas malsama ol tiu de plenkreskuloj. Ni ne povas uzi medicinaĵojn nek apliki malsatigan metodon. Unue ni devas garanti varmon kaj aliajn bezonojn surbaze de kutima kreskado. Tiuflanke ni ĉefe reduktas hidrokarbonon de la infanoj, t.e. ilian grason kaj ĉefmanĝaĵojn. Scienca strukturo de manĝaĵoj estas la unua paŝo de la infana malgrasigo. Samtempe ni devas helpi la infanojn havi bonan kutimon de manĝado, ekz. konsili al ili manĝi pli da fruktoj kaj legomoj kaj malpli da grenaj manĝaĵoj kaj konsili al ili malrapide maĉi por kvietigi ilian ĉiam kreskantan apetiton.

La grasuloj ne ŝatas sporti kaj nesportado grasigas la grasulojn. Tial ofta sportado por konsumi la superfluan grason estas alia grava metodo de malgrasigo. En la kursoj de infan-malgrasigo mi trovis preskribon de sportoj, kiaj ekskurso, naĝo, longdistanca kuro, ŝnurtransalto, kruro-levo surlite kaj saltado surloke.

S-ro Ding organizis tian kurson antaŭ du jaroj en la Pekina Oka Mezlernejo laŭ la sinteza metodo. Hodiaŭ 90% de la kursanoj havas ordinaran korpo-pezon.

Aliflanke, la gepatroj de la grasaj infanoj devas kulpigi ankaŭ sin mem pro ilia korpo-peziĝo. Nun la novaj porgepatraj kursoj kaj porgepatraj legaĵoj estas tre utilaj por tiuj, kiuj havas grasajn infanojn. ■



*Jangge-danco de pekinanoj*

# *En Zizhuoyuan-parko*

Fotoj de HAN HONG

*Lušeng-danco de mjaŭ-oj*



Turistoj kaj nacimalplimultanoj dancas inter bambuaj stangoj







Prezentado de nacimalplimulta danco

La pitoreska parko Zizhuyuan (Ziĝujūan) situas en la nordokcidenta parto de Pekino. En ĝi prosperas bambuoj, aromas lotusfloroj, ondas akvo kaj verdas monteto. Ĝi estas tre ŝatata de turistoj.

Por pliriĉigi la popolan kulturen vivon, oni okazigis en la parko prezentadon de nacimalplimulto. Gejunuloj de nacimalplimulto el sudokcidenta Ĉinio starigis en la parko konstruaĵojn en sia nacia stilo. Ili en nacimalplimultaj kostumoj prezentas kantojn kaj dancojn al turistoj.

Pavo estas simbolo de feliĉo. Junaj taj-oj alivestitaj kiel pavoj dancas pavan dancon kun graciaj paŝo laŭ ritmo de tamburado kaj gongado, esprimante, ke la taj-oj sopiras al feliĉo.

Gustumante teon, turistoj ĝuas kanton kaj dancon de baj-oj.

Gajaj kaj viglaj bambua danco de tong-oj kaj *luŝeng*-danco de mjaŭ-oj (*luŝeng*-o estas unu el la ĉinaj nacimalplimultaj blovinstrumentoj) estas tiel altiraj, ke la turistoj ne povas sin regi kaj ekdancas kune kun la dancantoj.

Kun granda plezuro



# “Ĉinaj Urboj” en diversaj landoj

**Ĉ**INOJ vivas ĉie en la mondo. Dum longa tempo ili estis influat-aj de eksterlanda kulturo kaj samtempe diskonigis la ĉinan. Rezulte de tio, en multaj lokoj de la mondo aperis “ĉinaj urboj”. En ili alilandanoj sentas ekzotismon de la antikva lando en la Oriento, dum ĉinoj povas aŭdi sian propran lingvon kaj vivi en manieroj intimaj al ili.

Sube mi konigas ĉinajn urbojn en diversaj landoj:

La “Ĉina Urbo” en Moskvo. Ĝi situas en duonronda kvartalo proksime al la Ruĝa Placo kaj Portalo de la Ĉina Urbo en Londono


Kremlo. En la urbo servas ĉinstilaj magazenoj kaj restoracioj. Tie oni povas ĝui ĉinajn pladojn kaj babili en la ĉina lingvo.


La “Ĉina Urbo” en San-Peterburgo, la dua granda urbo de Rusio. Ĝi estas turisma loko kun areo de 20 000 kvadrataj metroj, konstruita kune de Sovetunio kaj la Ŝanhaja Porekstra Kompanio de Kunlaboro en Ekonomio kaj Tekniko, kaj ĉiujare akceptas pli ol milionon da turistoj el diversaj partoj de la mondo. En la subteretaĝo servas amuzejo kaj galerio de etmangaĵoj kun gustoj de suda Ĉinio, preparitaj de famaj kuiristoj de Ŝan-

hajo. Tie la turistoj povas ĝui famajn ĉinajn pladojn.

La “Ĉina Urbo” en la urbo Ho-Chi-Minh de Vjetnamio. La tiea kvartalo Cholon loĝata de ĉinoj indas je la nomo “Ĉina Urbo”. Tie oni uzas ĉinajn ideogramojn kaj parolas la ĉinan lingvon. La nomoj de stratoj kaj ŝildoj de vendejoj estas senescepte skribitaj ĉinlingve. La vivkutimoj de tieaj loĝantoj neniom diferencas de tiuj de Guangdong kaj Fujian (Fuĝjan) de Ĉinio. Ili plejparte estas ĉinaj elmigrintoj kaj iliaj posteuloj. Multaj el ili loĝis origine en Chaozhou kaj Kantono de Guangdong.

Ĉina butikoj en Jokohamo





Ĉina Urbo en San-Francisko

La “Ĉina Urbo” en Romo. En 1985 la roma magistrato solenis sur la “Ĉina Placo” la fondigon de la loĝkvartalo “Ĉina Urbo”. Ĝi, kun placo kiel sia centro, kovras 60 hektarojn kaj povas loĝigi 300 000 homojn. En la urbo etendiĝas 18 movoplenaj stratoj, kiuj portas la nomojn Pekino, Ŝanhajo, Yangzi-rivero, Flava Rivero, Granda Muro k.a. respektive.

La “Ĉina Urbo” en Lisbono de Portugalio. La tieaj loĝdomoj, magazenoj, kinoteatroj kaj restoracioj distingiĝas per la ĉina arkitekturo. La urbo estas konstruita de komercistoj de Hongkong kaj Aomen.

La tri “Ĉinaj Urboj” en Parizo. Unu en la 13-a kantono. La alia en la Bela Urbo estis konstruita en la 80-aj jaroj, kun pli ol 20 000 ĉinoj kaj ĉinaj elmigrintoj. En ĝi funkcias 120 ĉinaj butikoj, restoracioj, memservejoj, establoj por bona proprieto, turismaj servoj kaj tujrestoracioj. La tria kuŝas en la Placo de Amikeco inter Ĉinio kaj Francio ĉe la kunfluejo de Sejno kaj Marno, kun areo de 12 000 kvadrataj metroj. Ĝi estas la unua “ĉina urbo” en Eŭropo projektita laŭ la arkitekturo de la kortego de Qing-dinastio (1644-1911). En ĝi estas

granda ekspoziciejo, 5-etaĝa kaj 3 440-kvadrata-metra kun muroj kaj turoj tute similaj al tiuj de la Imperiestra Palaco en Pekino, 11-etaĝa tristela hotelo kun 190 ĉambroj, ŝip-restoracioj kaj ankaŭ ĝardeno projektita laŭ ĉina ĝardenistiko.

La “Ĉina Urbo” en Londono. Ĝi situas en la kvartalo Lambeth de la distrikto de London-haveno, kie estas la Komerca Centro de Ĉinio kaj Eŭropo, Centro de Ĉina Kulturo, magazeno, ekspoziciejo, kvarstela hotelo kaj ĉinstilaj stratoj. La urbo estas dekorita ekskluzive el ĉinstilaj materialoj kaj parto de la urbo ĉirkaŭita de muroj, kiel la Imperiestra Palaco en Pekino. Sub la helpo de s-ro Wilson, eksa ĉefministro de Britio, ĝi estis konstruita de Tianjin kaj ICE-grupo de Britio.

La “Ĉina Urbo” en Bavario de Germanio. Ĝi havas historion de pli ol 100 jaroj. En ĝi aparte okulfrapas la vidindaĵo Fontano en Formo de Ĉino. Ĝi similas al ofiĉisto de Qing-dinastio, kiu, kun levita kapo, elstarigita ventro kaj lipharoj, rigardas la pasantojn per larĝe malfermitaj okuloj. El ĝia ventro senĉese elfluas klara akvo. Ĉiufebruare en ĝi okazas karnavalo kaj partoprenantoj alivestas sin kiel imperiestroj kaj kortega-

noj de la antikva Ĉinio.

La “Ĉina Urbo” en Nov-Jorko. Ĝi situas en Manhattan norde de la financa kvartalo de Nov-Jorko kaj estas konata kiel la kultura centro de eksterlandaj civitanoj de ĉina sangdeveno. Tie eldoniĝas sep ĵurnaloj kaj gazetoj en la ĉina lingvo kaj ankaŭ laboras du radiostacioj kaj tri televido destinitaj por ĉinlingva programo. La tieaj 100 000 civitanoj de ĉina sangdeveno povas ĝui ĉinajn filmojn, aĉeti ĉinajn lokajn produktaĵojn, kiaj ginsengo kaj teo, kaj kolektiĝi por celebri tradiciajn ĉinajn festojn.

La “Ĉina Urbo” en Paragvajo. La urbo de prezidento Storausna, komerca centro de Paragvajo, estas konata kiel originala “ĉina urbo”. Tie ĉinoj konsistigas ĉ. 3% de la loĝantoj kaj la butikoj de ĉinoj — 20%. La jara komercvaloro de la butikoj estas 40-50% de tiu de la urbo. Pli ol 3 000 ĉinoj laboras en ĉinaj restoracioj, kiuj servas per Sichuan-aj kaj Guangdong-aj pladoj kaj ankaŭ Taiwan-aj etmangaĵoj. Ĉinoj konstruis 17-etaĝan domon, la plej altan en la urbo, kaj funkciigas tie la Magazenon de Ameriko, plej grandan en la lando.

La “Ĉina Urbo” en Meksiko de Meksikio. Ĝi estas alia “ĉina urbo” de Nord-Ameriko. Plejparto de la tieaj ĉinoj venis el Taishan, Xinhui, Kaiping kaj Enping de Guangdong, tial ĝi portas ankaŭ la nomon Malgranda Kantono. En ĝi estas magazeno de ĉinaj varoj el la ĉina ĉeftero kaj Hongkong. La ĉina restoracio Longcheng povas akcepti samtempe milon da klientoj. En la urbo, krom ĉinstilaj domoj, estas ankaŭ butikoj kaj ĉiovendejoj, en kiuj abundas ĉinaj spicaĵoj, ladmangaĵoj kaj aliaj.

La “Ĉina Urbo” en Brisbano de Aŭstralio. Ĝi estas konstruita de ĉinoj en Brisbano de Kvinlando kaj ekfunkciis printempe de 1987. En ĝi estas multaj ĉinstilaj restoracioj, magazenoj, teatroj, avenuoj, kaskadoj kaj ankaŭ statuo de Konfuceo, 3 m. alta. ■





# Lulilo de fotistoj

Fotoj de HAN HONG

Instruisto en direktado

La Pekina Fotografia Lernejo por Geknaboj fondiĝis en 1987. Por kulturi la estetikan kreivecon de lernantoj kaj altiri ilin al fotografado, la lernejo prenis fotografian lecionon kiel gravan rimedon de estetika eduko.

Ĉiu klaso havas unu fotografian lecionon en semajno. La lernantoj ekkonas fotoaparaton en la 1-2-aj klasoj, eklernas foti en la 3-4-aj kaj levas la aprezan kaj praktikan nivelon en la 5-6-aj. En la vintraj kaj someraj ferioj la lernejo organizas vojaĝon de siaj lernantoj al aliaj lokoj por praktikado.


En fotografia kurso oni instruas al la lernantoj ami la vivon kaj naturon, observi ĉirkaŭajn objektojn kaj kapti per fotoaparato belajn figurojn.

Dum la pasintaj jaroj oni publikigis en diversaj ĵurnaloj pli ol 3 200 fotojn de lernantoj, el kiuj pli ol 2 100 estis premiitaj en diversaj konkursoj en- kaj eksterlande. Iliaj verkoj montras ilian fundamentan teknikon de fotografado, ilian naivan intereson en temo kaj esprimmaniero kaj ilian puran internan mondon.

Demonstrado



Konkurso Foto de HONG  
GUANG (7-jara)





Instruistino kaj lernantinoj

Foto de GUO JIA (12-jara)

### Fotado





ZHANG JIMIN:

# La plej profunda kanjono de la mondo

Ĉinaj sciencistoj esplorantaj la grandan kanjonon



**S**UR la majesta montaro Himalajo imponas du mirindaĵoj: la montpinto Qomolangma 8 848.13 m super la marnivelo kaj la profunda kanjono de la rivero Yarlung Zangbo.

## LA PLEJ PROFUNDA EL LA KANJONOJ

Ĉu la kanjono de la rivero Yarlung Zangbo estas la plej profunda en la mondo? Pri tio oni faris sciencajn esplorojn. Lastatempe ĉinaj geografoj, aerfizikistoj kaj botanikistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiuj faris esploradon en la kanjono dum longa tempo, laŭ la topografia mapo kaj aermapo en skalo de 1:50 000 faris sekcon al la kanjono inter la montpintoj Nanjiabawa 7 782 m super la marnivelo kaj Jialabailei kaj du komparajn sekcojn ĉe la frontaj nordo kaj okcidento trans la kanjono kun la montpinto Nanjiabawa kiel koordinato. Surbaze de tio, ili faris precizajn kalkulojn kaj la rezulto montras, ke la nomita kanjono meznombro profundas je pli ol 5 000 m, i.a. la plej profunda loko de la kanjono inter la montpintoj Nanjiabawa kaj Jialabailei estas 5 382 m.

La mondfama Kolca Kanjono, Peruo, profundas je 3 200 m kaj la valo de Kolorado, Usono, je 2 133 m. Estas evidentaj la diferencoj inter ili kaj la granda kanjono de la rivero Yarlung Zangbo.

Tiuj bravaj sciencistoj-esplorantoj prezentis ankaŭ pli detalajn donitaĵojn akiritajn en la ĉeloka esplorado pri la kanjono. La kanjono, iranta orienten, faris U-forman kurbigon ĉirkaŭ la montpinto Nanjiabawa kaj suden etendiĝas, kun totala longo de 370 km. Kaj la rektalinia distanco inter la du finoj de la U-forma kurbigo estas nur 39 km. La plej malgranda larĝo de la kanjono, nome ĝia kurbiga ekstremo, estas 74 m. La rivero Yarlung Zangbo ĉi tie torentas inter la apikaj klifoj. En iuj partoj oni ne povas trairi.

Kiel formiĝis la kanjono? En plioceno antaŭ 2 milionoj da jaroj kolizio de hinda kontinenta bloko kun la kontinenta bloko de Eŭrazio estigis drastan leviĝon de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, kiu altis nur pli ol 1 000 m super la marnivelo. La kanjono situas ĉe la orienta ekstremo de Himalajo, kie troviĝas kunligitaj blokoj kaj struktura turniĝo. La malforta loko de la terkrusto nature fariĝis taŭga akvo-vojo por torentado kaj atakado de la rivero Yarlung Zangbo. Kun daŭra drasta leviĝo de la terkrusto, la senĉesa fluado de la riverakvo pli profundigis la kanjonon.

## MIRINDAJ SPEKTAKLOJ EN LA KANJONO

En la Granda Kanjono de Kolorado de Arizono, Usono, regas seka aero, kreskas maldensaj vegetaĵoj kaj sur ĝiaj nudaj rokmuĝoj vidiĝas diversepokaj stratomoj de proterozoiko kaj kenozoiko. Sed en la



kanjono de la rivero Yarlung Zangbo kreskas densaj pluvarbaroj kaj ĉie regas verdaĵoj.

La subtropika zono de la norda hemisfero finiĝas per la norda tropiko. Kial kreskas tropikaj pluvarbaroj en la kanjono de la rivero Yarlung Zangbo, kiu situas norde de la norda tropiko je 5 gradoj? Oni devas atribui tion al la kanjono. Ĉar ĝi servas kiel norda enirejo por varm-humida aerfluo de la Hindia Oceano. La kanjono, tranĉante la montaron Himalajo, sin etendas suden al la Ganga Ebenajo de Hindio. Kiam la norden fluanta varm-humida vaporo de Bengalo atingas nordorienton de Hindio, ĝi enfluas en la kanjonon de la rivero Yarlung Zangbo, malhelpate de Himalajo. Sude de la U-forma kurbiĝo de la kanjono la deklivo baras la vojon al la norda aerfluo kaj tie formiĝis pluvozono kun jara pluvokvanto de pli ol 4 000 mm. Kaj la grandenergia vaporo pleniĝas en la kanjono kaj ruliĝas norden, ke la izopleto de jara pluvokvanto de 1 000 mm rekte etendiĝas de oriente de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo norden de Himalajo je 30 gradoj de norda latitudo. La jara pluvokvanto de la regiono estas duoble pli granda ol tiu en la aliaj samlatitudaj lokoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo.

Somere, en la kanjono de Yarlung Zangbo regata de varm-humida aerfluo, jen densiĝas nuboj, bruas tondroj kaj torentas pluvo, jen radias la suno, leviĝas vaporo kaj estas sufoke varme kaj malseke. Tiu medio favoras kreskon de la tropikaj kaj subtropikaj vegetaĵoj. Sciencistoj-esplorantoj konigas, ke tie kreskas arbegoj pli ol 30 m altaj, iliaj kronoj kiel grandega ombrelo plene kovras la teron. En profunda arbaro kreskas oliarboj, figoj (*Ficus gasparriniana*), Sri-Lankaaj homalioj (*Homalium*) kaj longtenilaj floroj, kaj rampas diversaj dikaj kaj lignecaj lianoj, kiaj gneto, kalamo kaj tetrastigmo (*Tetrastigma planicaule*). Krome, ĉe la montpiedo betelpalmoj alte staras kaj baŝoj donas abundajn fruktojn. Ĉe vilaĝoj verdas bambuoj kaj sukerkanoj, ĉe la vojoj prosperas malaltaj sovaĝaj oranĝarboj kaj limonarboj.

La kanjono de la rivero Yarlung Zangbo estas ankaŭ rifuĝejo por iuj antikvaj vegetaĵoj. Frosta fluo de la kvaternara glacia epoko mortigis sennombrajn vegetaĵojn. Feliĉe, tiuj en la kanjono postvivis ĝian balaadon kaj prospere kreskis. Nun multaj raraj vegetaĵoj, kiaj takakio (*Takakia lepidozoides*), diptero (*Dipteris conjugata*) de Himalajo, gneto (*Gnetum pendulum*), cugo de Yunnan, tetracentrano (*Tetracentran sinense*) kaj eŭpteleo, hodiaŭ ankoraŭ vidiĝas en la kanjono.

Pro siaj modera vetero kaj densaj arbaroj, la kanjono malmulte vizitata estas tre favora al la animaloj. Tie vivas sennombraj bestoj, kiaj konstriktoroj, najoj, bengalaj tigroj, cerkopitekoj, antilopoj kaj papilioj.

En la kanjono ankaŭ la nombro de estaĵaj specioj superis tiun en la aliaj samlatitudaj kaj sammarnive-

laj lokoj. Ĝi estas trapasejo de diversaj estaĵaj specioj migrantaj norden.

Antikvuloj rigardis la kanjonon kiel siajn trapasejon kaj loĝejon. Esplorantoj studis la eltrovitajn restaĵojn de antikvuloj, kiaj fajencaĵoj kaj bone prilaboritaj ŝtona hakilo kaj ŝpinrado, kaj asertis, ke aktivadis tie antikvuloj antaŭ 8 000 jaroj. Nun, la kanjono ankoraŭ servas kiel la homa vojo. Menbaoj kaj lobaoj tie interŝanĝas vivbezonaĵojn kun tibetanoj vivantaj sur la altebenaĵo.

Koncerne la abundajn riĉfontojn de la kanjono, la esplorantoj ofte prezentas mirindajn ciferojn: tie estas pli ol 3 600 specioj de vaskulaj plantoj, t.e. ĉ. triono de tiuspeciaj plantoj en Tibeto, 400 specioj de grandaj fungoj, t.e. ĉ. 60 procentoj de la jam konataj fungoj de Ĉinio, hektara akumulita kvanto de piceo kaj cugo atingis 2 300 kubmetrojn kaj la rezervokvanto de natura akvoenergio 68 800 000 kilovattojn.

## DANĜERA LOKO

Himalajo estas aktiva geologia regiono, kie daŭras la plonĝefiko de la hinda bloko al la eŭrazia. Post sia disiĝo disde Afriko en malfrua kretaceo, la hinda bloko norden moviĝas en la rapideco je 5 cm ĉiujare. La Qinghai-Tibeta Altebenaĵo leviĝas ĉiujare 10 mm. Kaj en la lastaj 10 000-20 000 jaroj Himalajo leviĝis ĉiujare 60-80 mm. Kaj la montpinto Qomolangma plialtiĝas senĉese. Ĉio ĉi kaŭzas oftajn tertremojn de la kanjono. Tertremo estas unu el la kaŭzoj estigi disfalon de oceana glacirivero kaj kot-ŝtonan fluon, kiu minacas la vivon de esplorantoj kaj loĝantoj.

Vespere de la 2-a de la 7-a monato de 1950 laŭ la tibeta kalendaro, tertremo estigis disfalon de glacirivero en la kanjono, giganta bloko de glacio ruliĝis malsupren de alteco je 3 500 m kaj ebenigis vilaĝon ĉe la rivero Yarlung Zangbo. Falinte en la riveron, ĝi kiel glacia digo pli ol cent metrojn alta ĉesigis la muĝantan fluon de la rivero portempe.

En 1985 okazis eksterordinare granda kot-ŝtona fluo ĉe la ŝoseo nomata "natura baraĵo de Parlung", proksime de la kanjono, la pli ol cent metrojn alta kot-ŝtona fluo en palpebruma daŭro englutis ŝtalan ponton, du buldozojn kaj 80 aŭtojn.

Oktobre de 1993 ekspedicio el ĉinoj kaj japanoj atingis la lokon. Iu japano eniris en la riveron Parlung Zangbo, la plej grandan branĉon de Yarlung Zangbo, por prova flosado, intencante fari mallongdistancon glitadon laŭ la rivero, sed neatendite, li involviĝis en la rivermezon kaj puŝiĝis en la riveron Yarlung Zangbo. La aliaj membroj de la ekspedicio trifoje serĉadis lin dum monato, sed malsukcesis.

Jen la granda kanjono de la rivero Yarlung Zangbo, la plej alta super la marnivelo kaj plej profunda sur la terglobo. Ĝi estas bela galerio, natura zoo kaj sopirata loko de la aventuristoj. Ĝi kun sennombraj misteroj atendas, ke oni deprenos ĝian misteran vualon. ■

# Kiamaniere elekti talentulojn en la antikva Ĉinio?

de HOU JUELIANG

**D**E la antikveco Ĉinio estas lando kun vasta teritorio kaj granda loĝantaro. Pro sia granda administrantaro ĝi bezonas multajn homojn por funkciigi diversnivelaĵajn registarojn.

Kiamaniere elekti ilin? En la malsamaj historiaj periodoj oni prenis malsamajn metodojn.

En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), laŭ la principo elekti virtulojn kaj enoficigi kapablulojn la korteganoj kaj altranguloj de lokaj registaroj rekomendis talentulojn al la centra registaro kaj tiu faris al ili kontrolon kaj enoficigis la taŭgajn.

En Jin-dinastio (265-420) la metodo ŝanĝiĝis. La kortego investis *ĝongĝeng*-ojn, ŝtatoficistojn, en diversaj lokoj, kies tasko estis elekti lokajn talentulojn kaj dividi ilin en la klasojn superan, mezan kaj malsuperan, ĉiu kun 3 gradoj. La kortego donis al ili malsamajn rangojn laŭ gradoj. Tio estis la 9-gradaj *ĝongĝeng*-a sistemo. La sistemo estis justa kaj utila en la komenco de sia praktikado. Oni sukcese elektis talentulojn el la malsuperaj sociaj tavoloj. Sed kun tempopaso estiĝis malavantaĝoj, ĉar la *ĝongĝeng*-oj plejparte estis reprezentantoj de lokaj bienuloj, kiuj ĉiam fiksis sian atenton sur posteuloj de la bienuloj kaj ĉiam alte taksis la devenon de la familio, sed ne la homan kapablon. Tiam nedistingiĝaj sinjoridoj povis esti prenataj kiel unuaklasaj pro sia nobela deveno, dum la malriĉaj

talentuloj ĉiam estis en la malsupera klaso malgraŭ sia eksterordinara kapablo. Pro tio aperis tute maljusta fenomeno, ke la superaj gradoj ne estis por malriĉuloj kaj la malsuperaj ne por riĉaj sinjoridoj. Tio malhelpis la ŝtatoficistigon de la erudiciaj eminentuloj.


En la dinastio Sui (581-618) estis nuligita la 9-gradaj *ĝongĝeng*-a sistemo kaj oni elektis talentulojn per ekzameno. Laŭ bezono la kortego faris tutlandan ekzamenon pri difinitaj studobjektoj kaj elektis el la ekzamenatoj la elstarajn por enoficiĝo. Tio ja rompis la limon de la familia deveno kaj kreis favorajn kondiĉojn por erudiciuloj montri sian talenton. Tio ja estis progreso en la feŭda socio. Ĝi daŭris 1 300 jarojn kaj estis nuligita nur en la komenco de la 20-a jc, antaŭvespere de la pereado de Qing-dinastio (1644-1911).

La poroficistiĝa ekzameno estis alte taksata de la regantoj de ĉiuj dinastioj de Ĉinio. La ekzameno fariĝis pli kaj pli rigora kaj sistema. Tiam, ĝenerale dirite, oni faris tian ekzamenon pri multaj studobjektoj ĉiun trian jaron. La ŝtato ekzamenis iam pri 90 studobjektoj. Kaj la plej malfacila estis porĝinŝi-a ekzameno. Ĉiufoje tre multaj intelektuloj partoprenis ĝin, ĉar la sukcesintoj en la ekzameno povis tre rapide promociiĝi. Ili estis kandidatoj por civilaj altranguloj. La kandidatoj devis trapasi ekzamenojn de 3 gradoj: Unue ili devis trapasi la provincan ekzamenon. La sukcesintoj en la ekzameno estis titolitaj kiel *ĝjujen*-oj. La tutlandaj *ĝjujen*-oj

devis trapasi la ĉefurban ekzamenon kaj la sukcesintoj estis titolitaj kiel *gongŝi*-oj. Kaj fine ĉiuj *gongŝi*-oj devis esti ekzamenitaj de la imperiestro mem. La sukcesintoj en la ekzameno estis titolitaj kiel *ĝinŝi*-oj. Ĉiufoje en la ekzameno oni titolis almenaŭ kelkdek aŭ iam eĉ 300 *ĝinŝi*-ojn. La imperiestro mem difinis la 3 unuajn *ĝinŝi*-ojn: La unua nomiĝis *ĝuangjŭan*-o, la dua *bangjan*-o kaj la tria *tanhŭa*-o.

*Ĝinŝi*-oj estis elstaraj el la partoprenantoj de la imperiestra ekzameno kaj *ĝuangjŭan*-o estis la plej elstara el la *ĝinŝi*-oj. *Ĝuangjŭan*-o estis tre glora: li paradis sur ĉefurbaj stratoj, rajdante sur ĉevalo, ĝuis festenon donitan de la imperiestro kaj estis gratulita de korteganoj. Ifoje la imperiestro eĉ edzinigis al li sian filinon. Li fariĝis tuj altrangulo. *Ĝuangjŭan*-iĝo estis aspirata preskaŭ de ĉiuj junaj intelektuloj en la feŭda socio de Ĉinio. Historiaj libroj notas, ke en Ĉinio estis entute 599 *ĝuangjŭan*-oj, 100 000 *ĝinŝi*-oj kaj miliono da *ĝjujen*-oj. Krom la civila ekzameno la ŝtato faris ankaŭ militan ekzamenon kaj tial en la ĉina historio estis multaj militaj *ĝuangjŭan*-oj. Dank' al tio, la kortego sukcese elektis multajn eminentajn komandantojn.

La sukcesintoj en la landskala ekzameno plejparte estis erudiciuloj. Por la ekzameno ili legis dum multaj jaroj. Ili studis klasikajn verkojn de konfuceanismo, tradician kulturon de Ĉinio, sciis la teorion pri regado de la lando kaj estis alte klerigitaj. Ili estis multe



Antikva ekzameno

pli kapablaj en oficado kaj ludis gravan rolon en protektado de la feŭda regado kaj administrado de la ŝtato. Kaj krome, ili faris ankaŭ gravajn kontribuojn por heredo de la nacia kulturo kaj disvolvado de la tradicia kulturo. En la ĉina historio multaj eminentaj poetoj, literaturistoj, historiistoj, filozofoj, reformistoj, politikistoj kaj strategiistoj havis la titolon de *ĝinŝi-o* aŭ *ĝuangjŭan-o*.

En Tang-dinastio (618-907) oni praktikis la ekzamenan sistemon, en kiu la ekzamenatoj nepre devis verki poemojn. Por tio oni konkure studis pri poezio. Pro tio en la dinastio poezio senprecedence prosperis kaj aperis multaj eminentaj poetoj, kiuj postlasis al la posteuloj pli ol 40 000 poemojn. Poeto Wang Wei ja estis *ĝuangjŭan-o* siatempe. Li estis eksterordinara talentulo, kapabla en verkado de poemoj, pentraĵoj kaj prozaĵoj. Oni laŭdis, ke liaj pentraĵoj estas poeziaj kaj liaj poemoj belaj kiel pentraĵoj.

*Super pinoj brila luno lumas,  
Inter rokoj klara fonto fluas.*


Jen bela priskribo pri la pinarbaro en hela nokto kaj ankaŭ pri la viva pentraĵo de la naturo.

*Ĝuangjŭan-oj* estis nepre produktaĵo de la poroficistiga ekzameno de Ĉinio kaj ankaŭ aparta kultura fenomeno. La studo pri iliaj travivaĵoj kaj meritoj ebligas koni la historion de Ĉinio kaj la kulturalan socian vivon en la antikveco. *Ĝuangjŭan-oj* plejparte estis ambiciaj en la administrado de la ŝtato. Ili deziris fari kontribuojn en politiko kaj literaturo por esti konataj de la posteuloj. Sed ilia idealo kaj la feŭda realaĵo estis kontraŭstaraj. La vojo estis ĉiam malglata por ili. S-ro Yang Shen, *ĝuangjŭan-o* en la mezo de la 16-a jc, intencis fari kontribuon en literaturo, kiam li funkciis kiel ŝtato-ficisto en la kortego, sed fakte li estis malfeliĉa. Foje, li honeste admonis la suveremon al batalo kontraŭ la feŭda etiko, kio kolerigis lin. Pro tio Yang Shen estis riproĉita, dufoje torturita kaj ne plu salajrata. Fine li estis ekzilita por 35 jaroj. Li devigite adiaŭis siajn familianojn kaj mortis en malproksima regiono. El la malfeliĉo de Yang Shen oni bone vidas la

diktatorecon kaj kruelecon de la imperiestroj kaj la mallumon de la feŭda ĉina socio. En la malfavoraj vivkondiĉoj Yang Shen tamen ne perdis sian politikan ambicion. Li daŭre studis, reordigis kulturajn heredaĵojn kaj verkis pli ol 100 librojn. Li fariĝis fama erudiĉiulo siatempe.

La poroficistiga ekzameno en la antikva Ĉinio estis profunde influa. Iuj okcidentaj landoj lernis la spertojn. Bedaŭrinde, tiu metodo havis mankojn siatempe: La ekzameno estis kadrita je konfuceanismanaj verkoj, kiuj multe malhelpis la ekzamenatojn studi aliajn sciencojn. Ili legis ekskluzive konfuceanismanajn verkojn, sed ne lernis naturajn sciencojn kaj tial disiĝis de la socia progreso. Tio ne utilis al la kultura intersango inter Ĉinio kaj Okcidento. La alia manko de la ekzameno estis, ke por ĝi oni difinis la nombron de ĉinaj ideogramoj kaj la strukturon de artikoloj. Tio serioze limigis la penson de la ekzamenatoj. Pro tiuj ĉi mankoj la ekzamena sistemo finis sian historian taskon en la komenco de la 20-a jc. ■





En leciono

PANG NAIYING:

# Amo al alilandaj infanoj

**C**IUMATENE, kiam infanoj kun malsamaj haŭtkoloroj ĝoje venas en la Elementan Lernejon Fangcaodi, maljuna lernejestro Yang Guojian ridetante bonvenigas ilin ĉe la enirejo kaj la infanoj reciprokas al li rideton.

En la pasintaj 21 jaroj tiu lernejo, sidanta ĉe la ambasadoreja kvartalo en la orienta antaŭurbo de Pekino, kulturis ne nur dekmi- lojn da ĉinaj infanoj, sed ankaŭ 1 200 infanojn el pli ol 100 landoj kaj regionoj.

## LERNADO DE LA ĈINA LINGVO

Instruisto pentris sur nigra tabulo *huoguo-on* (ĉina marmito). La infanoj bone konas ĝin, ĉar ili ĉiuj jam manĝis brogitan ŝafajon el ĝi. "Kiu scias, kio estas ĝia hejtaĵo?" demandis la instruisto, kiu estis lernigonta la ĉinan ideogramon "braĝo". Iu infano staris antaŭ la nigra tabulo, pentris elektran fadenon sur la *huoguo-o* kaj kunigis ĝin kun ŝtopilingo kaj alia infano pentris gasujon apud la

*huoguo-o*. Ĉe tio ekridis la instruisto kaj bone komprenis, ke ili ĉiuj uzis modernan *huoguo-on*. Li kondukis la lernantojn al la sportejo, bruligis branĉon kaj estingis ĝin, kiam ĝi tute karbiĝis. Poste li montris al ĝi, dirante: "Jen braĝo, hejtaĵo de *huoguo-o*."

Alilandaj lernejoj de Fangcaodi plejparte estas de ambasadoroj en Ĉinio. Ili parolas la lingvojn anglan, francan, germanan, japanan, rusan kaj aliajn. Pro manko de komuna lingvo, la instruisto do lernigas al ili ĉinajn ideogramojn pere de desegnoj, objektoj, diapozitivoj, gestoj kaj esprimoj.

Korvo soifis kaj volis trinki akvon, sed ĝi ne povis, ĉar akvo en botelo estis tre malprofunda. Kion fari? Por ke la infanoj eniru en tiun fabelan mondon, la instruisto provizis botelon per kolora akvo kaj poste lasis ilin enmeti ŝtonetojn en ĝin kiel la korvo. Vidante iom post iom leviĝi la akvon en la botelo, la infanoj tre ĝojis. Iafaĵe la instruisto adaptis tekstojn al dramoj kaj la infanoj ludis ilin kun diversaj kapornamoj. La dra-

moj, kiujn la infanoj tre ŝatis ludi kaj spekti, alportis al ili neesprimblan ĝojon.

Prononcado estas baraĵo en lernado de la ĉina lingvo, sed ĉiuj alilandaj lernejoj de Fangcaodi povas flue paroli ĉinlingve, ĉar iliaj instruistoj ne nur legis al ili antikvajn ĉinajn poemojn kun malsamaj rimoj, sed ankaŭ postulis de ili sin ekzerci per langotorda legado.

## "MI VOLAS PENTRI FLUGANTAN PORKON"

Estis fantazia leciono de pentrado: Vojaĝo en la spaco.

La instruistino ŝaltis videoaparaton, por ke la lernantoj observu stelojn en la spaco. "Rigardu, al kio similas tiu stelo kun lumringo?" demandis la instruistino. "Ĝi similas al homa kapo kun granda pajla ĉapelo," respondis unu el la lernantoj. "Kaj tiu kometo?" "Al granda balailo." "Al granda vosto..."

La instruistino postulis de la lernantoj laŭeble disvolvi sian imagipovon kaj pentri stelojn kaj aerŝipojn kun homfiguroj kaj in-



En konkurso pri parolado en la ĉina lingvo

trigo.

“Instruistino, mi volus pentri flugantan porkon,” diris bulgara knabino kun levita mano.

“Ĉu vi pentros ankaŭ aerŝipon?” demandis la instruistino.

“Mi volus pentri nur flugantan porkon, sur kiu mi vojaĝos en la spaco,” dirinte, ŝi sidigis.

Jen ŝi pentris porkon kun flugiloj sur papero.

La juna instruistino sukcesis, ĉar ŝia ĉefa celo estis per pentrado disvolvi la pensadon de infanoj, kulturi en ili imagipovon kaj kreivon. La 10-jara Darvino volis elkulturi malsamkolorajn florojn per malsamkolora akvo; kaj la 9-jara bulgara knabino volis krei porkon, ne plu kuŝema nek mallerta, sed povanta libere flugi en la spaco.

### “MI NE ESTAS SOLDATO!”

La knabo, simila al nigra gemo, refoje malaperis. Tiam li ridis al la instruisto, kaŭrante sub la pupitro de sia kamarado. Preskaŭ ĉiutage li kaŝludis kun sia instruisto en leciono. Kiam oni demandis lin, kial li ne aŭskultas al la instruisto,

li respondis: “Mi ne timas la instruiston, ĉar li ne batas min.”

Afrika knabino alportis multe da manĝaĵoj kaj manĝis ilin en leciono. Poste ŝi demetis la ŝuojn, metis ilin sur la pupitron kaj apogis la piedojn sur ĝi. Ŝi malĝojis, ĉar la instruisto montris, ke ŝi faris eraron en ekzercado aŭ ĉar ŝi volis respondi demandon, sed li tamen petis de iu alia fari tion.

Respondante demandon, usona knabo Petro sin apogis sur muro aŭ la brakojn sur la pupitro. Tiam la instruisto diris: “Petro, bone staru!” Sed li senkulpigis sin: “Tamen mi ne estas soldato!”

El ĉio supre dirita la instruisto rimarkis la influon de malsamaj kulturoj sur la infanoj. El la personeco de infanoj la instruisto trovis la diferencojn inter diverslandaj edukaj konceptoj kaj manieroj, ensorbis la sukcon kaj instruis konforme al la lernantoj el diversaj landoj.

La infanoj opiniis, ke la instruisto estas ilia sincera amiko, neniam riproĉas ilin kaj ĉiam pravvas. Li ofte diris, ke ili mem pensu, kion oni devas fari kaj kion ne.

Li diris: “Mi esperas, ke miaj lernantoj estos elstaraj en ĉiuj flankoj.” La malgranda “Nigra Gemo” trovis ankaŭ, ke la instruisto, kiu estas rigora al li, fakte lin protektas sekrete, ĉar li ne plu estas batita hejme.

### BOMBONOJ KAJ LARMOJ

“Vi nepre akceptu, instruisto, ĉar hodiaŭ estas mia naskiĝtago,” diris malalta knabino, levinte paketon da ĉokolado.

“Hodiaŭ ne estas mia naskiĝtago, sed vi devas akcepti, instruisto, ĉar ĉiu havas sian parton,” alta knabino levis la manon kun bombonoj el post la dorso... Por esprimi sian amon al la instruisto, la infanoj emis trovi pretekston por tio.

Jes, la instruisto estis afabla.

Li ripetfoje diris al novaj lernantoj: “Se vi volas iri al necesejo en leciono, iru kaj ne levu la manon por tio.” En la postlecionaj horoj li eĉ ne havis tempon por trinki, li instruis al ili ludi kaŭĉukan fadenon, piedvolanon kaj saketon kun sablo. Por ke la lernantoj bone komprenu matematikajn problemojn, li rekompilis ilin unu post alia per vortoj facile kompreneblaj por ili. En postlecionaj horoj li ofte akompanis lernanton, kiu atendis sian patron, ĝis malfrua tempo.

Filipina knabo ploris en la unua leciono, ĉar li sopiris al sia patrino.

La ĉefinstruisto sidis apud li, rakontis al li fabelon, ludis kun li kaj postulis de la klasanoj prizorgi lin... li ne plu ploris. Foje, la ĉefinstruisto iris al alia loko pro oficlaboro. Rimarkinte, ke li estas distrigema en leciono, iu instruisto demandis lin, ĉu li sopiras al sia patrino. Li respondis kun larmoj en la okuloj, ke li sopiras al la ĉefinstruisto.

Sincera amo konkeris la koron de la infanoj. Iu plorema knabino flustris al sia instruisto en la oreilon: “Mi simulis ploradon. En mia hejmo mi per tio cedigis mian pliaĝan fraton...”



Wang Junxia ricevis Owens-premion.

**V** ESPERE de la unua de februaro 1994, pli ol 500 usonanoj de la sportista rondo kunvenis en luksa halo de hotelo en Nov-Jorko. Tie okazis la ceremonio de la 14-a Internacia Memorpremio de Jesse Owens.

Post parolado de la prezidanto de la Usona Olimpika Komitato oni projekciis filmojn pri konkurso de ĉefaj kandidatoj al la 14-a Owens-premio. La lasta kandidato estis ĉina sportistino Wang Junxia (Ŭang Ĝjunŝja), ĉampionino de 10 000-metra ebenkuro de la Monda Atletika Ĉampionea Konkurso en 1993. Ŝi plurfoje rompis la mondan rekordon de longdistanca kaj mezlongdistanca kurado kaj fariĝis la plej rapida kuranto de virina maratono nuntempe. Kiam la prezidanto anoncis, ke ĉina sportistino Wang Junxia gajnis Owens-premion de 1994, en la halo tuj eksonis varma aplaŭdo.

Ĉiujare, en la mondo nur unu sportisto povas akiri Owens-premion, la plej altan gloron por sportistoj. Antaŭe, la premiitoj plejparte estis usonaj sportistoj, sed neniuj estis el Azio. Wang Junxia estis la unua azia sportisto, kiu gajnis tiun honoron. Oni gravuris ŝian nomon sur la glob-forma pokalo de Owens-premio.

Kun sunbruna haŭto kaj mallongaj haroj similaj al tiuj de knabo, Wang Junxia estas serena. Irinte

malglatan vojon, ŝi, fiŝista knabino, fariĝis monda ĉampionino de longdistanca kurado.

Wang Junxia diris: "Antaŭ ĉio mi devas danki miajn gepatrojn pro ilia subteno en mia kariero." Ŝi naskiĝis en fiŝista familio en ĉirkaŭurbo de Dalian, nordorienta Ĉinio. Kiam ŝi lernis en elementa lernejo, ŝi ŝatis kuradon kaj ofte partoprenis diversajn sportajn aktivadojn. Kiam ŝi lernis en la 5-a klaso en elementa lernejo, ŝi rompis la lernejan rekordon kaj gajnis la ĉampionecon de 400- kaj 800-metraj ebenkuroj en la lerneja sportkunveno. Kuraĝigite de la gepatroj, Wang Junxia ekzercis sin per longa kurado.

En 1985 Wang Junxia eniris en mezlernejon malproksiman de la hejmo. Ŝi deziris viziti lernejon per biciklo samkiel aliaj lernejanoj, sed pro manko de mono, ŝi povis nur piediri al la lernejo.

Sed tio kondukis ŝin sur novan vivovojon. De tiam ĉiutage Wang Junxia kuris al la lernejo, sekvante biciklantajn kamaradojn. Tiel ŝi devis kuri ĉiutage 16 km. Post kelka jaroj ŝi fariĝis tre rapidpieda.

En mezlernejo, Wang Junxia partoprenis multajn konkursojn kaj iom post iom famiĝis en longdistanca kurado. En 1988 Dalian okazigis atletikan konkurson por elekti geknabojn, kiuj havas potencialan forton en atletiko. Pro financa malfacilo, ŝia lernejo





Wang Junxia en paŭzo de trejnado



Wang Junxia post konkurso

ne partoprenis ĝin. Informiĝinte pri tio, Wang Junxia kun plorado revenis hejmen kaj petis sian patron partoprenigi ŝin en la konkurso. Por kontentigi ŝin la gepatroj mem pagis por la konkurso. Kaj Wang Junxia ne malesperigis ilin. Ŝi gajnis la unuan lokon en la 1 500-metra ebenkuro. Trejnistoj de sporta lernejo, kiuj atendis ĉe la fino, tuj ĉirkaŭis ŝin kaj faris al ŝi revizion pri la sanstato. Ili trovis, ke Wang Junxia, kun eksterordinara kor-pulma povo kaj forta revigliga kapablo, estas esperplena.

Ŝi estis elektita de la Dalian-a Sporta Lernejo. Ŝiaj gepatroj persone akompanis ŝin al la lernejo kaj foje-foje admonis ŝin: "Aŭskultu la trejniston kaj diligente vin ekzercu." Ili ofte vizitis ŝin kaj demandis ŝian trejniston pri ŝiaj vivo kaj trejnado. Ŝi ne malesperigis siajn gepatrojn kaj post mallonga trejnado ŝi povis fini 1 500-metran kuradon per 4'20", ŝi jam atingis la nivelon de majstrosportistino. Dank' al tio, Wang Junxia altiris la atenton de la provinca atletika rondo kaj oni rekomendis ŝin al fama trejnisto Ma Junren (Ma Ĝjun-ĵen).

Tute ekster ŝia atendo, post la korpa ekzameno, kuracisto diagnozis, ke ŝi estis trafita de hepatito. Trejnisto Ma malvolonte decidis sendi ŝin hejmen. Post tio trejnisto Ma sentis grandan bedaŭron kaj ne volis forlasi tiun esperplenan knabinon. Li telegrafis al ŝia patro kaj petis, ke tiu resendu sian filinon. Ma diris al ili: "Mi ne scias, ĉu Junxia povos resaniĝi rapide kaj daŭrigi la trejnadon aŭ ne. Mi faros ĉion eblan por resanigi ŝin. Se mi malsukcesos, mi resendos ŝin hejmen en la venonta printempo."

Dank' al la atentema flegado kaj prizorgo de trejnisto Ma, Wang Junxia resaniĝis kaj denove komencis la trejnadon. Ŝi ekzercis sin per pli kaj pli longa kurado. Poste ŝi kuris 30 km. matene kaj 12 km. posttagmeze. Tio egalas al la distanco de mara-

tono. Foje trapasante Siberion por partopreni la mondan ĉampionecon konkurson, ŝi malvarmumiĝis kaj suferis febron 5 tagojn. Malgraŭ tio ŝi partoprenis la konkurson kaj rompis la mondan rekordon.

Ŝi, knabineto kurinta sur vilaĝa vojo, nun fariĝis monda ĉampionino, sed ŝi neniam forgesis sian trejniston Ma Junren. Kiam ŝi rompis la mondan rekordon de 10 000-metra kurado en la 7-a Tutlanda Sportkunveno okazinta en 1993 en Pekino, la unua afero, kiun Wang Junxia faris, estis donaci la oran medalon al trejnisto Ma. Rememorinte tion, ankaŭ ŝia patro diris kun emocio, ke sen Ma ne estus la hodiaŭa honoro de Wang Junxia.

Antaŭ la monda atletika ĉampionecon konkurso en 1993, la teamo sankciis, ke Wang Junxia restu kelkajn tagojn hejme, Informiĝinte pri tio, oni venis viziti ŝin. Wang Junxia havis pli aĝajn fraton kaj fratinojn. Ĉe la adiaŭo, ŝia frato donis al ŝi 500 juanojn, por ke ŝi aĉetu nutraĵojn. Sed 5 tagojn poste, ŝia 23-jara frato mortis en trafika akcidento. Informiĝinte pri tio, Wang Junxia forte retenis la malĝojn, persistis en trejnado kaj partoprenis la konkurson kun nur unu ideo: Mi nepre gajnos la ĉampionecon por danki mian fraton dormantan por ĉiam sub la tero. Fine ŝi gajnis la ĉampionecon.

Jarfine de 1993, en la 5-a Mondpokala Konkurso de Maratono okazinta en Hispanio, ĉinaj sportistinoj gajnis la ĉampionecon, subĉampionecon, la trian kaj la kvaran lokojn kaj la teaman ĉampionecon. 3 kvin-stelaj naciaj flagoj de Ĉinio malrapide leviĝis kaj Wang Junxia refoje staris sur la podio. Propraokule vidinte, ke Wang Junxia ekrapidigis sian kuradon, kiam restis al ŝi ankoraŭ 7 cirkloj, la estro de japana atletika teamo diris: "Por ŝi, la kurado ne estas 10 000-metra, sed 800-metra." Tio montris la efektivajn fortojn de Wang Junxia. ■

### EKONOMIO

● La Kvina Azia-Pacifika Internacia Komerca Foiro okazis junie en Pekino.

Entreprenistoj de 3 000 fabrikoj el 30 landoj kaj regionoj eksponis en la foiro malpez-industriajn produktojn, maŝinajn ekipaĵojn, elektronikan teknikon, telekomunikajn ekipaĵojn, mediprotektajn instalaĵojn, altteknikajn patentitaĵojn, gemojn, juvelojn, vestojn, tradiciajn metiartaĵojn k.a. Ĉ. 500 000 homoj vizitis la foiron.

La foiro estis iniciatita de la Azia kaj Ekstrem-orienta Ekonomia Komitato de UN en 1962. Ĝi celas pligrandigi kaj disvolvi la ekonomian kunlaboron kaj komercajn rilatojn inter la landoj de tiu regiono kaj ilian ekonomian kunlaboron kun aliaj landoj. Antaŭe tia foiro okazis respektive en Tajlando, Irano, Hindio kaj Ĉinio.

● Junie sukcesis la sinteza eksperimentado pri la kvazaŭekspresa trajno, je rapideco de 180 km hore kaj tirata de lokomotivo kun marko Dongfeng 11, kiu kuris inter Kantono kaj Shenzhen (Ŝengen). Oktobre ĉi-jare oni faros provan veturigadon. Laŭ la plano, antaŭ la jarfino pasaĝera trajno kun rapideco de 160 km hore kuros sur la kvazaŭekspresa fervojo inter Kantono kaj Shenzhen. Tiam la vojaĝa tempo inter la du urboj reduktiĝos de du al ĉ. unu horo.



En la Internacia Aerodromo Fenikso de Sanya

● La Internacia Aerodromo Fenikso de Sanya en Hainan-provinco, la unua aerodromo de Ĉinio konstruita kaj administrata en formo de akcia sistemo, ekfunkcios post nelonge. La aerodromo ĉe la suda marbordo de la Speciala Ekonomia Distrikto de Hainan distancas oriente je 11.4 km de Sanya kaj okcidente je 5 km de la

vidindejoj "Ekstremo de la Ĉielo" kaj "Fino de la Tero". Tie povas leviĝi kaj surteriĝi aviadilo B747-400.

● La Pekina Ekspozicio de Fajnaj Produktoj de la Mondo kaj Traktado pri Ekonomia kaj Komerca Kunlaboro de 1994, grava popola ekonomia kaj komerca aktivado inter Ĉinio kaj Kanado, okazis en Pekino antaŭ nelonge. La aktivadon partoprenis la kanada delegacio el dek parlamentanoj reprezentantaj diversajn konsorciojn. Pli ol cent entreprenoj kanadaj kaj okcident-eŭropaj eksponis siajn produktaĵojn de la industrioj energia, trafika kaj telekomunika, tekstilaĵojn, vestojn, elektronikajn aparatojn, aŭtojn kaj tonikajn manĝaĵojn.

● Nun la dezerto, dezertiĝa kaj efloreska tero de Ĉinio kovras ĉ. 1 530 000 kvadratajn km, t.e., 15.9% de la teritorio de Ĉinio. Laŭ takso de la Forstokultura Ministerio de Ĉinio, se oni ne alprenus efikan rimedon, la dezertiĝa areo kreskus ĉiujare je 2 300 kvadrataj km en la venontaj dek jaroj.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Por akceli la internaciigon de la ĉinaj sciencoj, la unuaj akademianoj de alilanda ŝtataneco estos elektitaj en la Ĉina Akademio de Sciencoj laŭ severa procedo.

Ili faris grandan kontribuon al la ĉina sciencoteknika afero kaj ĝuas grandan renomon internacie.



Profesoro Tsung-dao Lee, nova akademiano de alilanda ŝtataneco

● Apliko de la nuklea tekniko en la ĉina agrikulturo, precipe la tekniko de radiada semokulturado, estis alte taksata de la Internacia Atomenergia Agentejo. Per radiada tekniko Ĉinio elkulturis 383 bonrasajn mutaciajn speciojn, kiuj konsistigas ĉ. trionon de la totala nombro de muta-

genikaj specioj de la mondo.

- Shao Li, pordoktoreca studentino de la Pekina Universitato, kaj aliaj, aplikante genan inĝenierion, kulturis en malalta konvolvulo kun purpuraj floroj du florojn. Unu estas purpura-blanka kaj la alia blanka. Ili ripetis la kulturadon kaj denove sukcesis. Tio estas senprecedenca en Ĉinio.

### TURISMO

- Nun la ĉina turisma merkato fariĝis pli kaj pli stabila.

Krom la ĉefaj flughavenoj de Pekino, Tianjin kaj Kantono, ankaŭ nemalmultaj turismaj urboj kaj ĉefurboj de diversaj provincoj havas regulajn aŭ neregulajn kursojn al Hongkong, kaj unu post alia malfermiĝas aerlinioj al aliaj landoj. Rapide grandiĝas la procento de unuopaj turistoj el Singapuro, Japanio, Hongkong, Aomen kaj Taiwan. 6% de la turistoj el Usono kaj Kanado venas en grupoj kaj 70% de la britaj turistoj unuope.



Palankeno de Zhoukou en Pekino

- En iuj turismaj punktoj de Pekino sidi en palankeno jam fariĝis programo ŝatata de turistoj. Plejparto de la palankenoj estas farita en Zhoukou de Henan-provinco.

La palankeno de Zhoukou havas historion de pli ol 2 000 jaroj. Antaŭe oni uzis ĝin nur por porti novedzinon al la novedzo. Nun pli ol cent tieaj popolaj artistoj venis al Pekino kun siaj palankenoj, por ke ĉinaj kaj alilandaj turistoj ĝuu la antikvan kulturon de centra Ĉinio.

### KULTURO

- La libro "Enciklopedio de la Mondo", eldonita de la Monda Libroeldona Kompanio de Usono, estas unu el la libroj, kiuj havas grandan debiton en la mondo.

Antaŭ nelonge la Popola Eduka Eldonejo de Ĉinio akiris la rajton eldoni ĝin ĉinlingve kaj vendi ĝin sola en Ĉinio. La ĉina eldono en formo de la originalo estos finita en plena kompleto en 1998.

- Antaŭ nelonge la Suzhou-a Brodaĵa Instituto de Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco finis la grandegan harbrodaĵon "Suda inspektado de Kangxi".

La brodaĵo sur helflava tafto longas je 641 cm kaj larĝas je 65 cm. Ĝi, brodita el longaj virinaj haroj, reaperigis la solenan inspektadon far imperiestro Kangxi (1661-1722 sur trono) en Suzhou. La brodaĵo perspektive prezentas la konturon de urboturoj, pontoj, palankenoj, ĉevaloj, ŝipoj, pagodoj k.a. La brodaĵo surhavas entute 2 478 homfigurojn kaj 1 042 ĉambrojn. Ĝi plene prezentas siatempan prosperon de Suzhou.

### MEDIPROTEKTADO

- Ĉinaj zoologoj trovis tri brunajn kaj unu blankan grandajn pandojn ĉe la suda piedo de Qinling-montaro en Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco. Fakuloj opinias ilin la plej belaj sovaĝaj bestoj de la mondo.

### SPORTO

- Ekde la komenco de la 50-aj jaroj, kiam oni unufoje surgrimpis Qomolangma, en la mondo 574 esploristoj surgrimpis la unuan montpinton de la mondo, 8 848.13 m super la marnivelo. 16 el ili estas virinoj.

### SOCIO

- En 1993 la nombro de la loĝantoj de Ŝanhajo, inkluzive de migrintoj el aliaj lokoj, jam superis 15 milionojn. La natura kresko de la loĝantaro de Ŝanhajo estis -0.078% kaj la municipo la unua efektivigis negativan kreskon de natura loĝantara ŝanĝiĝo inter la ĉinaj urboj kun pli ol miliono da loĝantoj, kaj tiel ĝia loĝantara ŝanĝiĝo atingis la nivelon de la evoluintaj landoj.

- Por ke la seninfanaj maljunuloj povu ĝui familian feliĉon kaj ne estu solecaj, la maljunulejo de Shenyang en nordorienta Ĉinio starigis 28 "simulajn familiojn" ekde 1987.

La familio konsistas el geavoj, nepo kaj nepino, kiuj lernas en elementaj lernejoj. La infanoj ofte vizitas la maljunulojn, helpas al ili solvi malfacilojn kaj festas ilian naskiĝtagon. Iuj el ili eĉ invitas maljunulojn al sia hejmo por pasigi festotagojn.



# Wang Anjian, kolektanto de horloĝoj

Teksto de YAN WEIMIN

Fotoj de YAN JIN

**G**ASTOJ de Wang Anjian (Ŭang Anĝjan) senescepte miris pro tio, ke la diversaj horloĝoj en lia hejmo montras diversajn horojn. Ĉu la horloĝoj malguste iras aŭ li intence tion faris? Ambaŭ ne. Ĉar Wang Anjian ne povis elteni la grandan bruon de la samtempa horanonco de pli ol cent horloĝoj en sia malgranda ĉambro de dekelke da kvadrataj metroj.

La plej granda el la horloĝoj kolektitaj de Wang altas 2.5 metrojn. Ĝi estas kesthorloĝo farita de Francio en la 19-a jarcento. La plej malgranda estas germana murhorloĝo, kiu altas nur iom pli ol unu colon. Kaj la germana ronda tablohorloĝo havas plej longan risorton, ke streĉite ĝi povas iri 400 tagojn.

Lia plej granda poŝhorloĝo pezas 500 gramojn, kaj la plej multvalora emajlita poŝhorloĝo estas inkrustita per 150 perloj.

Inter liaj kolektaĵoj estas britaj, francaj, germanaj, usonaj, japanaj kaj ĉinaj horloĝoj produktitaj inter la 18-a kaj 20-a jarcentoj. Parto el ili estas kuriozaĵoj.

En lia ĉambro oni povas vidi usonan tablohorloĝon kun flutanta soldato sin apoganta sur la horloĝo, produktaĵo de la 19-a jarcento. Oni povas vidi ankaŭ horloĝon en rado de tandem, faritan de Germanio en la 19-a jarcento, kaj la spokoj servas kiel la montriloj de la horloĝo. Inter liaj kolektaĵoj troviĝas germana horloĝo sur postiljona ĉevalo, kies tri risortoj servas respektive por batado, veko kaj horanonco. S-ro Wang Anjian diris, ke ĝi estas rudimento de moderna vekhorloĝo. La vizitantojn interesas ankaŭ la gotika kampanila tablohorloĝo, la bizanca kupola horloĝo, la romia peristila horloĝo, gnomono kaj diversaj tempomezuriloj uzataj en la akva, tera kaj aera trafiko.

Wang Anjian multe oferis por sia kolektado. Antaŭ 40 jaroj li jam profunde interesiĝis pri diversaj belformaj horloĝoj. Tiam li enspezis ĉiumonate nur iom pli ol 70 juanojn. Li ne fumis, nek drinkis, kaj neniam domaĝis monon por akiri ŝatatajn objektojn. Foje li pagis duonmonatan enspezon por difektita

japana horloĝo en formo de duobla hundo. Kaj lia svisa demandhorloĝo estis akirita kontraŭ la mantelo de la edzino, kiun ŝi havis ĉe la edziniĝo. Por akiri longe deziratan tablan ekranan horloĝon de Qingdinastio (1616-1911), li pagis la tutan monsumon, kiun li pretigis por novjara festo.


Wang Anjian estis tre sperta en riparado de malnovaj horloĝoj. Foje iu instruisto donacis al li preskaŭ disfalintan horloĝon faritan antaŭ ĉirkaŭ 200 jaroj. Nur post tri monatoj Wang Anjian sukcesis

S-ro Wang Anjian







En la hejma horloĝa muzeo de Wang Anjian



Emajlita horloĝo



Horloĝoj faritaj de Japanio, Germanio kaj Usono



Svisaj poŝhorloĝoj

refunkciigi la horloĝon.


Krom kolektado de horloĝoj Wang Anjian sin okupis ankaŭ je esplorado pri horloĝoj. Li kolektis multe da materialoj pri horloĝoj, kio larĝigis lian vidkampon. Laŭ la materialoj Wang trovis astronomian horloĝon produktitan de svisa kompanio Nardin. Li havis originalan opinion pri la invento de horloĝoj, pri kiu longe disputis Oriento kaj Okcidento. Li opiniis, ke evoluo de la ekonomio kaj kulturo de Oriento kaj Okcidento kune naskis horloĝon. Lia tezo baziĝis sur tio, ke en 1360 ĉinoj elpensis kvinradan sablohorloĝon, kaj la nunaj horloĝoj havas kvin radojn; samtempe kun tio, germanoj inventis meĥanikan horloĝon movatan per pezaĵoj.

Kolekti kaj konservi historiajn objektojn por la ŝtato, jen estas la celo de Wang Anjian en lia kolek-

tado. Li neniam rifuzis donaci materialojn al muzeoj, doni al ili konsultiĝon, fari ekspertizon aŭ ripari por ili malnovajn horloĝojn. Li estis unika neprofesia membro de la Muzea Asocio de Ĉinio, kaj lia horloĝa muzeo starigita en 1984 estas la unua hejma muzeo de Ĉinio.

Estis malfeliĉe, ke s-ro Wang Anjian forpasis pro malsano en la 16-a de julio 1990. Li postlasis riĉan kolekton da horloĝoj, al kiu li dediĉis sian tutan energion. Liaj du filoj daŭrigis lian kolektadon kaj akiris novan sukceson en kolekto de pli da specoj da horloĝoj. Unu el iliaj kolektaĵoj estas germana "avina horloĝo" produktita antaŭ duonjarcento, kiu fariĝis "parulino" de la "ava horloĝo" kolektita de Wang Anjian antaŭ multe da jaroj. ■





La lago Nahuel Huapi

de **ROBERTO GUILLERMO PONS** (Argentino)

Sekigo de vestoj

de **SIEGFRIED BAIER** (Germanio)



ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第十期

(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2

